

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Sur Altay-stepo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono la kazaha paŝtistoj okazigas unu-foje ĉiujare amuzan kunvenon, en kiu popolaj kantistoj kantas akompanate de muzikilo.

Foto de HUANG LUKUI



INTER NI

Mi profitas la okazon por sugesti al vi kreadon de rubriko pri la orient-azia movado kaj ties progresoj, venkoj, problemoj kaj perspektivoj.

I. MATTOS ANDRADE
ÁVILA (Brazilo)

Pro manko de koncernaj kontribuajoj, ni ne povas fari rubrikon de vi deziratan, tamen ni laŭeble aranĝos kaj publikigos artikolojn pri tiuj temoj, kia "Esplor-vojaĝo tra Azio — konkludoj, planoj..." en la 6-a numero de 1990. Kontribuajoj de niaj legantoj, precipe de la legantoj en Azio, estas ĉiam bonvenaj.

La Red.

Vi povas enlistigi en kelkaj paĝoj de EPĈ la titolojn, prezojn kaj nombron de paĝoj de ĉiuj libroj aĉeteblaj en la libroservo de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Tio helpus la aktualigon de la libraĵoj kaj bibliotekoj de multaj Esperanto-grupoj.

Disvastiga Esperanto-Grupo
(Brazilo)

Baldaŭ ni publikigos titolojn kaj prezojn de novaj libroj. Krome, niaj legantoj povos akiri katalogon ĉe niaj perantoj.

La Red.

Mi preferas artikolojn pri la ordinara vivo kaj kutimoj en Ĉinio kaj rakontojn aŭ artikolojn por komencantoj.

F. M. WESTRINK
(Nederlando)

Ni ricevis de tempo al tempo leterojn de niaj legantoj, kiuj volas pli multe legi artikolojn en tiuj flankoj. Ni kontentigos la postulon de niaj legantoj.

La Red.

ENHAVO

- 16 **40 jaroj de la fizikkultura kaj sporta afero de Ĉinio**
- 14 **Pri la "Baza Leĝo de la Speciala Administra Distrikto Hongkongo"**
- 6 **Por vestoj de 1.1 miliardoj da loĝantoj**
- 21 Vizito de la Ardea Insulo
- 45 Sapiro al la hejmlando
- 52 **SCENEJO KAJ EKRANO:**
 Pekina opero "Cao Cao kaj Yang Xiu"
- 36 Hejmo de pentristoj
- 27 **POEMO • KALIGRAFAJO • PENTRAJO:**
 Pri "Tranokto ĉe la Ponto de Acero"
- 32 Zhang Jinbiao, pentristo de pando
- 46 Butera floro
- 30 Raraj ŝtongravuraĵoj de Han-dinastio
- 26 Kiam ŝi trovis sakon kun granda sumo...
- 34 Malantaŭ la muro de malliberejo
- 47 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (15):**
 Vojaĝo en Wumeng-monto
- 10 **FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:**

- Amatoroj de la pekina opero
- 40 **AMUZOJ:**
 Ĉina ŝako (VIII)
- 42 **MI KAJ ĈINIO:**
 En miaj rememoroj mi ĉiam kun sento konservas Ĉinion
- 19 Eroŝenko kaj la ĉina E-movado
- 39 **POR KOMENCANTOJ:**
 Plumo
- 20 **ESP-NOVAĴOJ**
- 43 **SUR NIA LIBROBRETTO:**
 Lukse-rave pri Ĉinio
- 4 **INTER NI**
- 13 **KORESPONDI DEZIRAS**
- 38 **KURANTAJ AFEROJ**

SUR LA KOVRILO:

Cao Cao kaj lia edzino, sceno el la pekina opero "Cao Cao kaj Yang Xiu"

Foto de LI CHUNGENG

2 Amuza kunveno de popolaj kantistoj

Foto de HUANG LUKUI

4 Lotusfloro


Foto de LIU SIGONG


SUR LA DORSKOVRILO:
 [ĈINAJ POŝTMARKOJ]

Utilaj birdoj

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Xiamen
2. Xiahe-gubernio
3. Ŝanhajo
4. Tibeta Aŭtonoma Regiono
5. Jiaxiang-gubernio





En la Qinghe-a Lanteksejo de Pekino

Foto de JI ZENGYUAN

Homoj en belaj vestoj sur stratoj



Por vestoj de 1.1



En vendejo



Teksto kaj fotoj de D. W. S.

VESTOJ estas necesaj por la homoj. La problemo de vestoj longtempe ĉagrenis Ĉinion. Lastatempe mi eksciis de la Tekstila Ministerio de Ĉinio, ke la tekstila industrio de Ĉinio rimarkinde disvolviĝis en la pasintaj pli ol 10 jaroj de reformado kaj pordomalfermo. Tio ne nur garantiis al la popolo vestojn, sed ankaŭ ebligis al la ĉinaj tekstilejoj havi 31.54 milionojn da spindeloj kaj al la nombro de teksmaŝinoj kaj la prestinktura kaj silkobobena kapablo okupi la unuan lokon en la mondo, ke Ĉinio fariĝis granda tekstila lando. Eĉ en 1989, kiam la merkato estis malvigla kaj la industria ekonomio malprospera, ĉiuj ĉinaj tekstilejoj venkis la malfacilojn kaj ilia produktado kreskis kun certa rapideco kaj ilia industria produktovaloro en tiu jaro atingis 130 miliardojn da juanoj.

NULIGO DE KOTONTEKSAĴO-KUPONOJ

En 1949, kiam la nova Ĉinio fondiĝis, ĉiu ĉino konsumis ĉiujare meznombre nur 2.3 metrojn da

En la Suzhou-a Kemifibra Fabriko

Foto de **JI ZENGYUAN**



kotona ŝtofo kaj pli ol 6 metrojn en la 50-aj jaroj, tamen la kotona teksaĵo ankoraŭ ne povis kontentigi la bezonon. Sekve la registaro ekuzis kuponojn en 1954 por porciumi kotonajn teksaĵojn. La porciumado estis praktikata 30 jarojn. Kvankam la ŝtato tre atentis la tekstilan industrion dum tiu periodo, tamen la disvolviĝo de la tekstila industrio estis limigita pro historiaj, politikaj kaj ekonomiaj kaŭzoj kaj la vestoj de la popolo ne pliboniĝis radikale.

En la fino de la 70-aj jaroj Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformado kaj pordomalfermo, prenis la ekonomian konstruadon kiel ĉefan laboron kaj, post reguligo de proporcio, ellaboris serion da politikoj favoraj al la tekstila industrio. Tio multe akcelis la produktadon de tekstilaj krudmaterialoj kaj la disvolviĝon de la tekstila industrio. Sole la kotona produktokvanto de 1978 ĝis 1984 pliiĝis je 400 000 kg., meznombre je 19% ĉiujare; ankaŭ la miksa, kotona kaj kemifibra teksaĵo disvolviĝis, kaj la totala tekstila produktovaloro multe kreskis kompare kun tiu antaŭ 20 jaroj.

Kvankam la nombro de la ĉina loĝantaro pliiĝis je 500 milionoj kompare kun tiu en la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, tamen ĉiu loĝanto ricevis po 19.4 metrojn da kotona ŝtofo en 1983. Tiam la tekstila merkato revigliĝis. Tial la registaro decidis ekde decembro 1983 nuligi kotonteksaĵo-kuponojn. Tio signifas, ke Ĉinio finfine solvis la problemon de vestoj.

En la Pekina Tria Tekstilejo en la orienta antaŭurbo mi vidis ĉiujn laborejojn viglaj kun bruantaj maŝinoj. Iuj maŝinoj estas malnovaj, tamen por ĉefaj laborprocedoj oni jam uzas avangardajn instalaĵojn. Respondeculo de la tekstilejo diris al mi, ke post la 30-jara konstruado la nombro de la spindeloj de la tekstilejo kreskis de 80 000 al 120 000 kaj dum la 30 jaroj la tekstilejo produktis sume pli ol 580 000 tunojn da kotonaj fadenoj kaj 3 miliardojn da metroj da kotonaj ŝtofoj. La tekstilejo eksportas sian produktaĵon al la eŭropa merkato, ĉiujare ricevas 40 milionojn da usonaj dolaroj kiel profiton kaj fariĝis ĉefa entrepreno eksportanta teksaĵon.

PRODUKTADO POR KONSUMANTOJ

La malfermita Ĉinio fariĝis bunta. La antaŭajn bluajn, grizajn kaj verdajn uniformojn oni anstataŭigis per belaj modernaj vestoj. Multaj alilandaj amikoj emocie diris: "En la lastaj jaroj la ĉinaj vestoj pli kaj pli beligiĝis."

Por konsumantoj nuligo de kotonteksaĵo-kuponoj signifas ne nur ke teksaĵoj povas kontentigi la konsumantojn en kvanto, sed ankaŭ ke la konsumanta kutimo komencis sin turni de atento nur pri fortikeco al tiu pri koloroj, specoj kaj fasonoj; kaj por produktantoj ĝi signifas, ke ili eniris en epokon konkurenci por ekzisti kaj disvolviĝi. Antaŭ nelonge mi informiĝis de "Ĉina Tekstila Gazeto", ke la aŭtunaj kaj vintraj vestoj en 1990-1991 en Ĉinio estos nature ĉarmaj, ruĝaj, iuj en formo de militista uniformo kaj en moda fasono, kun tri vivecaj bazaj

koloroj, en gusto de antikveco, nuntempo kaj en ĉina kaj alilanda gustoj kaj ravos per miksa kreado. La nova projektado estas admirinda. Tio montras, ke nun la ĉinaj vestoprojektaj institucioj povas akordigi la tekstilajn kaj tinkturajn entreprenojn kaj direkti la konsumon laŭ konsuma kaj estetika penso de konsumantoj kaj ludas apartan rolon en vastigo de merkato de tekstilaĵoj.

La ĉiam kreskanta konsuma bezono senĉese defias kolorojn kaj specojn de teksaĵoj, ke la tekstilaj entreprenoj devas turni sin de sola produktado al produktado kaj entreprenado, tiel estis detruita la sistemo de la planizita aĉetado kaj vendado praktikata de la ŝtato en pli ol 30 jaroj kaj enkondukita la merkata sistemo. La tekstilaj entreprenoj komencis sondi la penson de konsumantoj, produktado ekfrontis al konsumo kaj specoj fariĝis pli kaj pli multaj.


Nun dilonaj pseŭdosilkaĵoj havas grandan debiton. Mi venis al la Ĉina Ĝenerala Kompanio de Silka Industrio. Jiang Hengjie, respondeculo de la kompanio, diris al mi, ke en 1989 la kompanio organizis en la tuta lando 12 produktajn liniojn de fibrotraktado, ŝpinado, teksado, tinkurado kaj vestofarado, kaj kreis tiujare pli ol 400 specojn kaj pli ol 800 desegnojn de dilonaj pseŭdosilkaĵoj, kiuj estis aĉetataj konkure en la merkato. En aprilo ĉijare, en la Pekina Magazeno estis pli ol 1100 specoj kaj desegnoj de dilonaj pseŭdosilkaĵoj, kiuj altiris tre multajn klientojn. La produktaĵo havas avantaĝojn de silko kaj kemia fibro: brileco kaj supleco, kaj la prezo estas malpli alta ol silko, tial ĝi estas tre ŝatata de virinoj. Wu Wenyin, ministro de la Tekstila Ministerio de Ĉinio, donis al la dilonaj pseŭdosilkaĵoj la nomon "Bela".

Krome, la tekstilaj entreprenoj ankaŭ kreis serion da novaj specoj de ornamaj teksaĵoj kaj produktaĵoj el ramio, kunikla lano k.a. Tio ludis pozitivan rolon en stabiligo de la ĉina merkato, intensigo de eksporto kaj garantio de certa disvolvigo de la tekstila industrio.

LA UNUA EKSPORTATA KOMERCAĴO

En la totala eksportovaloru de la ĉinaj komercaĵoj la tekstilaĵoj okupas la unuan lokon. De la Tekstila Ministerio mi eksciis, ke en 1989 la ĉinaj tekstilaĵoj enspezis 13.124 miliardojn da usonaj dolaroj, kiuj konsistigas 1/4 de la totala eksportovaloru de la ĉinaj komercaĵoj.

La eksportovaloru de la tekstilaĵoj de Ĉinio kreskis de nulo en 1949 al 2.16 miliardoj da usonaj dolaroj en 1978, konsistigante 3% de la tiama monda komerca valoru de tekstilaĵoj, kaj per tio Ĉinio okupis la 11-an lokon en la mondo. Kaj en la sekvantaj pli ol 10 jaroj, kun la praktikado de la politiko de reformado kaj pordomalfermo kaj ŝanĝo de la entreprenada strategio fare de la tekstilejoj la eksportovaloru de tekstilaĵoj kreskis je 18.6% ĉiujare, konsistigante 6% de tiu de la mondo, kaj per tio Ĉinio okupis la 5-an lokon en la mondo.



Aŭtomata instalaĵo importita de la Pekina Tria Tekstilejo

Dum longa tempo Ĉinio eksportis ĉefe kotonajn fadenojn kaj kotonajn ŝtofojn kaj malofte fajnajn tekstilaĵojn. Por altigi la relevantan kapablon, la tekstilaj entreprenoj senĉese reguligis la dispozicion kaj faris teknikan reformadon. Naskiĝis kemifibraj entreprenoj kaj multe plifortigis trikaj, reproduktaj kaj vestofaraj entreprenoj, kio ebligis al la eksporta strukturo de tekstilaĵoj ŝanĝiĝi iom post iom de elementaj produktaĵoj al altklasaj.

Antaŭ 1987 la urbo Tianjin ĉiujare eksportis 28000 pakojn da kotonaj fadenoj kaj 60 milionoj da metroj da kotonaj ŝtofoj. Poste ĝi decidis doni duonon de ili al tinkturaj entreprenoj por fajna prilaboro. En 1988 la fajne prilaboritaj produktaĵoj konsistigis pli ol 87% de la eksportitaj tekstilaĵoj. La eksporta aĉetvaloru de kotonaj fadenoj kaj kotonaj ŝtofoj konsistigis nur 12.76% de la totala eksporta aĉetvaloru de tekstilaĵoj. Kaj la tinkturaj entreprenoj gajnis plej multe da fremdaj valutoj el la tekstilaj kaj tinkturaj entreprenoj de Tianjin. En 1987 la Tinkturejo de Tianjin sola gajnis 50 milionojn da usonaj dolaroj da fremdaj valutoj.

En 1988 inter la eksportitaj tekstilaĵoj de Ĉinio 60% estis fajne prilaboritaj produktaĵoj kaj el ili la vestoj okupis preskaŭ duonon. Tiu procento estis multe pli alta ol antaŭe.

La ĉina tekstila industrio jam havas solidan bazon. Estonte en intensa konkurenco en malfermitaj mondpartoj ĝi daŭre persistos en reformado por pli bone disvolvi kaj fortigi sin mem. ■



Amatoroj en parko

FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

AMATOROJ DE LA PEKINA OPERO

Teksto de LIU YISEN

Fotoj de LING YOUJUAN

Gaja prezentanto





Li bone ludas.

DE la lastaj jaroj, kiam furoras en Pekino populara muziko, roko, disko-o kaj krev-danco, estas malmulte atentata la pli-ol-200-jara pekina opero, kiu ĝuis la plej altan renomon el ĉiuj ĉinaj teatraĵoj. Sed tamen, sur stratoj kaj en parkoj de Pekino, oni renkontas tre facile amatorojn de la pekina opero,


kiuj ĝoje kantas akompanate de muzikiloj.

“POR LA OPERO MI ELUZIS TRI MAGNETOFONOJN”

Proksime de la posta enirejo de Beihai-parko troviĝas skvaro, kie prosperas floroj kaj herboj, en ĝia sudokcidento staras kiosko, frekventata de operamantoj de la



Filino de amatoro en prezentado



Antaŭ senpaga prezentado

Prezentado de pekina opero





Orkestro

4-5-a horo ĉiutage posttagmeze. En aprila tago mi tie aŭdis, ke iu kantas melodion per voĉo de ĉingji (rolo de serioza mezaĝa virino, alinome "ĝengdan"). En la kiosko sidis malgranda orkestro: ludantoj de kordinstrumentoj, tamburoj kaj lignoklakiloj. La spektantoj junaj kaj maljunaj ĝojplene batis takton per la kapo, mano aŭ piedo laŭ la ritmo de la muzikaĵo, kaj de tempo al tempo aŭdiĝis aplaŭdo. Entrudiĝinte, ekster mia atendo mi vidis, ke altstatura viro kantas ritmoplene kun sufiĉaj gustoj de la pekina opero.

"Mi lernis kanti la pekinan operon nur kelkajn jarojn. Mi ne havis instruiston, nek scias la muziknotojn. Mi kantas nur dank' al miaj sento pri muziko kaj bona voĉo. Aĉetinte kelkajn kasetojn plaĉajn al mi, mi foje-refoje aŭskultis kun duonfermitaj okuloj, batante la takton kaj remaĉante. Tiamaniere mi aŭskultas kaj kantas imitante la registritan muzikaĵon."

"Mi malkaŝe diru al vi, ke mi jam eluzis tri magnetofonojn por aŭskulti la muzikon. Ho jes, la magnetofono estas ne multekosta, nur je ĉ. cent juanoj. Kiam la

televida stacio elsendas la pekinan operon, mi ĝin registras por la posta primedito pri la movmaniero de la manoj, okuloj, korpo kaj piedoj. Ĉar la pekina opero estas arto alte rafinita, iuj kvankam povas kanti kelkajn melodiojn en ĉingji, tamen sur scenejo ili iras tute simile al viro."

Maljuna amaturo de pekina opero



Li, 55-jara emerita fervojisto, devenis de la familio de pekin-opera aktoro.

"Mia patro ja estis aktoro de la pekina opero. Ho ve! En la pasinteco oni kutime malamamis sian okupon. Dum sia vivo, mia patro obstine malpermesis al mi lerni la pekinan operon. Alie, mi ja fariĝus fama aktoro pro mia bela voĉo."

"ONI NOMAS MIN ESTRO"

La 84-jara Wei Shijie kun bruna vizaĝo kaj flavetaj okuloj antaŭe okupiĝis pri transporto. Li eklernis la pekinan operon en la aĝo de 8 jaroj. Tiam, en la strato, kie sidas lia hejmo, funkciis butikoj de vermiĉeloj. La butikmastro Zhuang amis la pekinan operon. Pro sia malbona voĉo, li devigite ludis kordinstrumenton. Ofte li invitis amikojn kanti muzikaĵojn de la opero aŭ petis la junan Wei kanti kelkajn melodiojn.

"Tiu tempe, ĝenerale oni ne permesis al siaj gefiloj aktoriĝi, kvankam ili estis malriĉaj. Oni povis ludi nur por sin distri. En tiu periodo, aktoro, barbiro kaj piedflegisto estis malestimataj, sed hodiaŭ ilia laboro estimata. Antaŭe ĉe la aktoriĝo oni devis

subskribi vivmortan kontrakton, t.e. la opertrupo ne respondecis pri malsano kaj morto de siaj membroj.”

“Oni nomis min estro. Tio estas ŝerco. Vere, mi loĝis tie longe. Tiam tie ankoraŭ ne estis kiosko. Ni ofte venis tien kaj nin amuzis. En la lastaj jaroj, multiĝis miaj kamaradoj. En serena tago, oni kantas en kaj ekster la kiosko, en tri aŭ kvar grupoj, ofte ĉeestas pli ol cent personoj. Ju pli da ludantoj de kordinstrumentoj, des pli da kantantoj. Kiam venis nova kamarado, mi do aranĝas, kiun rolon li ludas. Ĉe la kverelo mi ĉiam pacigis la malakordiĝintojn.”

“Nun tie preskaŭ ĉiuj distriĝantoj estas emeritoj, kiuj ricevas ĉiumonate pension de pli ol cent juanoj. Post manĝo kaj trinko ili venas ĉi tien por sin amuzi, certe ne por kverelo.”

Kriplula motorciklo venis kaj haltis tuj antaŭ la kiosko.

Montrante la junulon en la motorciklo, Wei diris al mi: “Tio estas sinjoro Zhang. Li bone kantas melodiojn laŭ la skolo de s-ro Qiu Shengrong (vira rolo kiu ĉefe kantas). Antaŭe li laboris kiel skafaldisto. En akcidento li kripliĝis kaj nun sin vivtenas de la ŝtato kaj nun frekventas la lokon en libera tempo por sin amuzi.”

“PLI INTERESE OL LUDI MAĜANGON”

La parko Suna Altaro estis loko, kie la imperiestroj kultis la dion Suno. En ĝia sudokcidento estas bela pitoreskejo kun rektangula kiosko. Ankaŭ tie ofte kolektiĝas amatoroj de la pekina opero. Li Guoying, 81-jara maljunulino, ofte vizitas la lokon. Ŝi kantas per profunda voĉo de maljuna ŝeng (rolo de mezaĝa viro).

“En 1940, mi diplomitiĝis el la Pekina Instruista Universitato. Nun iuj el miaj lernantoj estas pli-ol-60-jaraj. Ĵus mi kantis fragmenton el la antikva pekina opero ‘Silang Vizitas Sian Patrino’. Mia voĉo ne povas atingi la postulatan altan noton, ĉar mi hodiaŭ

iaŭ kantis tro multe. En la pasintaj tagoj mi sukcesis tion fari.”

“Kiam mi lernis en universitato, mi lernis la pekinan operon iom. Poste, oni petis, ke mi ludu rolon de palaca servistino. Emeritiĝinte, mi ofte promenas eksterdome por min ekzerci. La onia amuziĝo vekis mian intereson. Mi opinias, ke tio estas pli interesa ol ludi maĝangon en la hejmo!”

“ĜI NE VELKOS”

S-ro Fan Guozhi, 70-jara kaj ordema, en simpla vesto, parolas ĉiam kun rideto. En 1956, kiam la Laborista Amatora Pekinopera Trupo fondiĝis en Pekino, li funkciis kiel ĝia estro. Li konas multajn amatorojn de la opero. Antaŭe li laboris en banko kaj nun okupiĝas pri la postlabora aktivado de la pekina opero en la Chaoyang-a Laborista Kultura Palaco. Oni povas diri, ke li estas eterna amato de la opero.

“En 1979, fondiĝis la Chaoyang-a Amatora Pekinopera Trupo. En la pasintaj 10 jaroj ĝi prezentis pli ol 160 teatraĵojn, pli multe ol profesia trupo. Antaŭtagmeze de ĉiu dimanĉo, ni okazigas oratorion en la kultura palaco por vigligi la vivon de la loĝantoj. Ĉiuj ĉeestantoj estas libervolaj. Nun en Pekino ekzistas ĉ. 30 aktivejoj similaj al la nia, ĉiu po dekoj da personoj. Kun tiuj en la parkoj, eble aktivus ĉ. 4000 amantoj de la pekina opero.”

“Mi amas la pekinan operon dum la tuta vivo. Mi ĉagreniĝis pro ĝia depresio. La pekina opero, trezoro de Ĉinio, plejparte temas pri antikvaj historioj kun malpli rapida ritmo. En la okuloj de multaj gejunuloj ĝi estas malpli alloga ol popoj kaj rokoj. Tial ankaŭ la pekina opero devas esti reformita. La 24-an de aprilo okazis konkurso de la pekina opero inter pekinaj kaj tianjin-aj amatoroj. Tiutage al la konkurso venis multaj spektantoj. De tio mi trovis, ke la pekina opero ne kadukiĝos. Kaj plie opero, arto harmonie formita de muziko, literaturo, danco kaj belarto, ne havas kialon por velki.”

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50. da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

● La Esperanto-grupo en Dresden (Germana Demokratia Respubliko) festas dum septembro sian 25-jaran jubileon en la kadro de Kulturligo de nia lando kaj planas ekspozicion kun bildkartoj kaj koresponddeziroj, ĉefe de niaj ĝemelaj urboj. Tiamaniere ni volas demonstri la utilecon de Esperanto. Ĉiu salutanto ricevos respondon per bildkarto el nia urbo. Kulturbund der DDR, Stadtleitung, Esperanto, Kaitzer Strasse 82, DDR-8020 Dresden.

● Yuan Zhigang, 25-j. instruisto, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Di Er Zhong Xue, Wannian, Jiangxi, Ĉinio, 335500.

● Fraŭlo Fan Yusheng, 23-j. studento, serĉas leteramikojn el diversaj landoj, interŝ. pm. bk. Certe respondos. Skribu al: Dongmen Lu 9-35, 648200 Fengdu, Sichuan, Ĉinio.

● S-ro Li Guohua, 32-j., dez. kor. tm. pri ĉt. Esperante, hinde kaj ĉine, kaj interŝ. literaturajn librojn. Adr.: Chao Yang Gong Dian Ju, Chang Chun Dian Ye Ju, Changchun, Jilin, Ĉinio.

● S-ro Wang Huaiyu, 9 Hao 17 Li, 2 Duan, Guilin Jie, Heping Qu, 110002 Shenyang, Liaoning, Ĉinio.

● S-ro Liu Jianguo, 25-j., dez. kor. precipe kun okcidentanoj, ĉefe fraŭlinoj, pri diversaj temoj: kulturaj objektoj, popolaj kutimoj aŭ moroj, historio, politiko, vojaĝo kaj E-movado. Adr.: 2 Hao Xin Xiang, Hefei, Anhui, Ĉinio.

● Membroj de E-lernogrupo (18-22-j.) dez. kor. tm. pri literaturo, fotado, interŝ. Esperantaĵojn, pm. pk. ktp. Certe respondos. Adr.: S-ro Xie Laijun, Jiaohe Di Er Gaoji Zhongxue, Jiaohe, Jilin 132500, Ĉinio.

Pri la "Baza Leĝo de la Speciala Administra Distrikto Hongkongo"

de FENG HUA

La 4-an de aprilo 1990 la 3-a Sesio de la 7-a Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko aprobis la "Bazan Leĝon de la Speciala Administra Distrikto Hongkongo". Ĉi-sube ni koncize respondos al niaj legantoj pri iuj demandoj koncerne la bazan leĝon.

La Red.

Demando: Ĉinio publikigis la projekton "unu lando, du sistemoj". Ĉu la "Baza Leĝo de la Speciala Administra Distrikto Hongkongo" enkorpiĝas tiun ĉi projekton?

Respondo: "Unu lando, du sistemoj" estas fundamenta principo farita de la ĉina registaro por realigi la unuecon de sia lando. Observante tiun ĉi principon, la ĉina registaro ellaboris serion da principoj koncerne Hongkongon. Ili estas jene: En 1997, kiam Ĉinio restarigos sian suverenecon super Hongkongo, fondiĝos speciala administra distrikto rekte sub la Centra Popola Registaro. La Speciala Administra Distrikto Hongkongo ĝuos altan aŭtonomecon, escepte de nacidefendo kaj eksteraj aferoj, pri kiuj respondecos la Centra Popola Registaro; Hongkongo ne praktikos la socialismajn sistemon kaj politikon, en ĝi restos senŝanĝaj la antaŭaj kapitalismaj sistemoj socia kaj ekonomia, ne ŝanĝiĝos la antaŭa vivmaniero nek la leĝoj fundamente; ne ŝanĝiĝos la pozicio de Hongkongo kiel internacia financa centro kaj libera haveno; kaj la ekonomiaj avantaĝoj de Britio kaj aliaj landoj en Hongkongo estos protektataj. Dum 50 jaroj ne ŝanĝiĝos la ĉinaj politikoj rilate Hongkongon. La 31-a artikolo de la Ĉina Konstitucio specifas: "Se necese, la ŝtato sankcios la fondiĝon de speci-

ala administra distrikto. En la distrikto la praktikata sistemo estas difinita de la tutlanda popola kongreso laŭ konkretaj kondiĉoj surbaze de koncerna leĝo." La baza leĝo de Hongkongo determinas la supre diritajn principojn kaj politikojn en formo de leĝo surbaze de la konstitucio kaj sub direktado de la projekto "unu lando, du sistemoj".

La ellaborado de la baza leĝo de Hongkongo komenciĝis la 1-an de julio 1985. La komisiono pri ĝia ellaborado, kiu konsistis el personoj de la landinterno kaj Hongkongo, estis sankciita de la 11-a Sesio de la 6-a Tutlanda Popola Kongreso. En 4 jaroj kaj 8 monatoj de laboro oni akceptis proponojn de diversaj rondoj de Hongkongo kaj la landinterno kaj faris multon da revizioj. Aprobite de pli ol 2/3 de la membroj de la komisiono, la baza leĝo (malneto) estis prezentita al la 3-a Sesio de la 7-a Tutlanda Popola Kongreso.

Dem.: Ĉu Hongkongo ĝuos altan aŭtonomecon post la ekpraktiko de la leĝo?


Resp.: Jes. La 12-a artikolo de la leĝo specifas: "La Speciala Administra Distrikto Hongkongo estas loka administra regiono de la Ĉina Popola Respubliko, ĝuanta altan aŭtonomecon kaj gvidata rekte de la Centra Popola Registaro." La artikolo klare

difinas, ke Hongkongo estas parto nedisigebla de Ĉinio kaj ankaŭ speciala administra distrikto, kiu ĝuas altan aŭtonomecon kaj praktikas sistemon kaj politikojn malsamajn ol tiuj de la landinterno.

La alta aŭtonomeco de Hongkongo specifita de la baza leĝo inkluzivas administrecon, leĝdonecon, sendependan jurisdikcion kaj rajton de fina juĝado. Krome, komisiite de la centra registaro, ĝi povas mem trakti ankaŭ iujn eksterajn aferojn.

Koncerne la administrecon, la baza leĝo specifas, ke observante la leĝon, la speciala administra distrikto rajtas mem trakti siajn administrajn aferojn kaj ankaŭ ĝuas aŭtonomecon en financo, ekonomio, industrio, komerco, trafiko, eduko, sciencoj, teknikoj, traktado de en- kaj ellandiĝo k.a., ekz. la distrikto tenas financan memstarecon, ne pagas al la centra registaro, kiu ne postulas imposton de Hongkongo kaj Hongkongo rajtas mem fari monon kaj emisii ĝin.

Koncerne la leĝdonecon, la baza leĝo specifas, ke la leĝoj, ellaboritaj de la Hongkonga leĝdona institucio, ekvalidas tuj post la formala subskribo kaj publikigo de la ĉefo de la administracio, kvankam ili devas esti prezentitaj al la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kon-



La flago kaj emblemo de la Speciala Administra Distrikto Hongkongo

greso por endosieriĝi, kio tamen ne malhelpas ilian validecon. La Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko malpermesos nur la leĝojn, kiuj malobservos la Bazan Leĝon de la Speciala Administra Distrikto.

La ĉina konstitucio specifas, ke la rajto de leĝekspliko apartenas al la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko. Konsidere la apartajn kondiĉojn de Hongkongo, la baza leĝo difinas, ke la Hongkonga kortumo povas ekspliki la artikolojn pri la aŭtonomeco de la speciala administra distrikto, kiam ĝi juĝas kazojn. Kompreneble, la rajto ekspliki la bazan leĝon restas ĉe la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

Laŭ la baza leĝo la Hongkonga kortumo havas memstaran jurisdikcion kaj rajton de fina juĝado. Por loka kortumo tio sendube estas escepto.

Dem.: Kiujn fundamentajn rajtojn kaj devojn havas la loĝantoj en Hongkongo laŭ la difino de la baza leĝo?

Resp.: La rajtoj, liberoj kaj devoj difinitaj de la baza leĝo de Hongkongo baziĝas sur la realaj cirkonstancoj de Hongkongo laŭ la principo "unu lando, du sistemoj", ekz. la protekto de privataj riĉaĵoj, libero de en- kaj ellandiĝo, nelimigita nasko, konkretaj difinoj pri la protekto de la riĉaĵoj de privatuloj kaj leĝaj personoj ktp. Krome, la baza leĝo don-

as plurgradan garantion al la rajtoj kaj liberoj de la Hongkongaj loĝantoj. Konsidere la konsiston de la Hongkongaj loĝantoj, ĝi difinas ne nur la ĝeneralajn rajtojn kaj liberojn de la loĝantoj, sed ankaŭ la rajtojn de la konstantaj loĝantoj kaj ĉinaj civitanoj. Ĝi difinas ankaŭ, ke la aliaj personoj ol la Hongkongaj loĝantoj ĝuas la samajn rajtojn kaj liberojn laŭ la difino de la leĝo. Krom la supre diritaj, la loĝantoj de Hongkongo ĝuas ankaŭ aliajn rajtojn kaj liberojn garantiatajn de la leĝoj de la speciala administra distrikto. Krom la speciala ĉapitro pri la rajtoj kaj liberoj de la Hongkongaj loĝantoj, ankaŭ en aliaj ĉapitroj legiĝas similaj difinoj. Tial la leĝo maksimume garantias la rajtojn kaj liberojn de la Hongkongaj loĝantoj.

Dem.: Kia estas la politika sistemo de la distrikto laŭ la difino de la baza leĝo?

Resp.: La politika sistemo de Hongkongo devas konformiĝi al la principo "unu lando, du sistemoj". Ĝi devas defendi la interesojn de diversaj socitavoloj surbaze de la leĝa pozicio kaj realaj kondiĉoj de Hongkongo, por garanti la stabilecon kaj prosperon de Hongkongo. Ĝuste pro tio, en la baza leĝo legiĝas jenaj difinoj pri la politika sistemo de la distrikto.

Unue, la administracio kaj leĝdona institucio devas kaj deteni unu la alian kaj kunlabori unu

kun la alia. Por daŭrigi la stabilecon kaj administran efikon de la distrikto, la ĉefo de la administracio rajtas formale subskribi kaj publikigi leĝojn, formale subskribi financajn buĝetojn, malorganizi la leĝdonan institucion k.a. Tamen la registaro devas observi la leĝojn, esti detenata de la leĝdona institucio, ekz. praktiki la validajn leĝojn ellaboritajn de la institucio, regule fari raporton pri sia laboro kaj respondi koncernajn demandojn al la institucio. Se la ĉefo de la administracio serioze malobservos leĝojn aŭ perdos sian devokonscion kaj ne eksigos sin, la leĝdona institucio povos akuzi lin laŭ ia proceso kaj raportu tion al la Centra Popola Registaro por peti decidon.

Due, la nomumo de la ĉefo de la administracio estas sankciita de la Centra Popola Registaro post elektado aŭ interkonsiliĝo. La estigo de la ĉefo de la administracio devas esti laŭ la realaj cirkonstancoj kaj la principo "paŝo post paŝo" por atingi la celon, ke komisiono el diversondaj personoj laŭ demokratia proceso prezentu la kandidatojn por la ĝenerala balotado.

Trie, la leĝdona institucio naskiĝas post elektado laŭ la realaj cirkonstancoj kaj la principo "paŝo post paŝo" kaj fine plenumiĝos la ĝenerala balotado.

Kvare, la ĉefo kaj ĉiuj membroj de la administracio, prezid-

(Daŭrigo sur p.41)

40 jaroj de la fizikkultura kaj sporta afero de Ĉinio

LA fizikkultura kaj sporta afero de la nova Ĉinio komenciĝis de tre malalta nivelo. Dank' al penado en la pasintaj 40 jaroj, ĝi multe disvolviĝis. Ĉi-sube ni retrospektive rigardas al ĝia pasinteco.

DISVOLVIĜO DE LA AMASA FIZIKKULTURA KAJ SPORTA AFERO


Kun la disvolviĝo de produktado kaj dank' al la pliboniĝo de vivkondiĉoj, la nombro de la korpo-ekzercantoj kreskis jaro post jaro en Ĉinio, kaj la popola sanstato pli kaj pli boniĝis. Laŭ statistiko, en la pasintaj 40 jaroj la korpo-ekzercantoj je 380 milionoj da homfojoj atingis la nor-

mojn de fizikkulturo difinitajn de la ŝtato. La meznombra vivdaŭro de ĉinoj longiĝas konstante kaj nun ĝi atingis 69 jarojn.

En Ĉinio fondiĝis diversnivela sportaj organizoj, kiuj ludas pozitivan rolon en la disvolviĝo de la amasa fizikkultura kaj sporta afero. En Ĉinio 41.61 milionoj da oficistoj kaj laboristoj partoprenas en korpo-ekzercado; ankaŭ kamparanoj viglas en sportaj aktivadoj. En 1988 en la tuta lando okazis 60 000 sportaj konkursoj ĉe la nivelo de distrikto aŭ urbeto, kun 14 milionoj da konkursantoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio okazis 3 nacimalplimultaj

sportkunvenoj, en kiuj kelkmil sportistoj el 55 nacimalplimulto prezentis pli ol 100 tradiciajn sportajn ludojn. Uŝu-o, ĉigong-o kaj aliaj trovis ŝaton en la popolamaso. 400 000 el la 50 milionoj da kripluloj en la tuta lando ofte faris korpo-ekzercadon, kaj surbaze de tio fondiĝis la Ĉina Fizikkultura kaj Sporta Asocio de Kripluloj. Ĝi okazigis 2 sportkunvenojn de kripluloj. Kripluloj plurfoje partoprenis en internaciaj sportaj konkursoj de handikapuloj. En 1988 Ĉinio sendis 43 kriplulojn partopreni en la Handikapulaj Olimpikoj kaj gajnis 44 medalojn. En la Handikapula Sportkunveno de la Malproksima Oriento kaj

Halterlevisto Chen Jingkai



Tablotenisisto Rong Guotuan





Membroj de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo

Sud-pacifika Regiono, okazinta antaŭ nelonge, ĉinaj handikapuloj gajnis 99 orajn medalojn kaj okupis la unuan lokon.

VIGLIĜANTA LERNEJA SPORTADO

La Eduka Komisiono de Ĉinio difinis, ke fizikkulturo estas prenita kiel deviga kurso por la lernantoj de la unua lernojaro en element-lernejo ĝis la dua lernojaro en altlernejo. 64.39 milionoj da lernantoj en diversnivelaĵoj atingis la ŝtatajn normojn pri fizikkulturo. La konstitucio de la ĉinaj geknaboj rimarkinde fortikiĝis. Laŭ enketoj faritaj en 1979 kaj 1985, la staturado de geknaboj en la ĉinaj urboj kreskis je 2.8 cm pli alte en ĉiu jardeko kaj tiu de la kamparo je 4 cm; kaj la korpa pezo de la antaŭaj kreskis je 1.8 kg pli multe en ĉiu jardeko kaj tiu de la lastaj je 2.7 kg.

Por kulturi altnivelaĵojn sportistojn, en la lastaj jaroj multe disvolviĝis sportaj lernejoj, kies nombro kreskis de 27 en 1983 al 136 en 1988, kun 30 000 lernantoj. Tiuj lernejoj diversnivelaĵoj estas gravaj bazoj por kulturi ĉinajn sportajn talentulojn. Por

disvolvi lernejan sportadon Ĉinio okazigis 4 tutlandajn mezlernejanajn sportkunvenojn kaj 3 tutlandajn studentajn sportkunvenojn kaj partoprenis sesfoje en monda studenta sportkunveno kaj gajnis sume 37 orajn medalojn.

ATINGOJ EN LA MONDSKALAJ KONKURSOJ

Antaŭ 1949, en kiu fondiĝis la nova Ĉinio, ĉinaj sportistoj partoprenis Olimpikojn trifoje kaj gajnis neniun poenton. En 1956 Chen Jingkai, halterlevisto de la nova Ĉinio, la unua rompita mondrekordon. Post tio, en 1959, tablotenisisto Rong Guotuan gajnis la unuan mondĉampionecon en la ĉina historio. Ĝis nun ĉinaj sportistoj 93-foje kreis kaj superis mondrekordojn kaj gajnis 391 mondĉampionecojn. Antaŭ 1979 Ĉinio gajnis mondĉampionecojn nur en tablotenis, volano kaj rapida sketado. Poste, ankaŭ en gimnastiko, halterlevo, plongo kaj pafado ĝi gajnis mondĉampionecojn en mondskalaj konkursoj.

Volano estas unu el la plej fortaj sportbranĉoj de Ĉinio. Ĉi-

naj volanistoj gajnis 52 ĉampionecojn en mondskalaj konkursoj. En 1986 la Ĉina Vira Volana Teamo kaj la Ĉina Virina Volana Teamo gajnis la plej altajn mondajn premiojn — Thomas-pokalon kaj Uber-pokalon. En 1987 Ĉinio gajnis ĉiujn 5 orajn medalojn en la 5-a Monda Volana Ĉampioneca Konkurso, kaj 4 el la 5 oraj medaloj en 1989. Ĉinaj plongistoj gajnis 29 mondĉampionecojn de post 1981. En la mond-pokala konkurso okazinta en la lasta jaro, Ĉinio gajnis 7 el la 9 ĉampionecoj. Ĝis nun en tablotenis, honorita kiel ŝtata pilkludo, Ĉinio gajnis 66 mondĉampionecojn. La Ĉina Virina Flugpilka Teamo gajnis mondĉampionecojn en 5 sinsekvaj fojoj, kio okazis neniam en la historio de la monda virinaflugpilko. Ankaŭ en la malfrue leviĝintaj sportbranĉoj, kiaj naĝo, atletiko kaj boatkonkurso, Ĉinio gajnis rimarkindajn sukcesojn. En 1988 naĝistino Yang Wenyi kreis mondrekordon, kio estis senprecedenca inter la ĉinaj naĝistaj rondoj. En la 24-aj Olimpikoj ĉinaj naĝistinoj gajnis 4 medalojn.

Ĉinaj sportistoj partoprenis en la 7-10-aj Aziaj Sportkunvenoj. En la 7-a Azia Sportkunveno Ĉinio okupis la trian lokon, en la 8-a la duan kaj en la 9-10-aj la unuan laŭ la sumo de gajnitaj oraj medaloj. En 1984 kaj 1988 la ĉinaj sportistoj partoprenis en la 23-aj kaj 24-aj Olimpikoj kaj gajnis sume 20 orajn medalojn.

SPORTA SCIENC-ESPLORA LABORO DE ĈINIO

En 1958 komenciĝis la sporta scienc-esplora laboro de Ĉinio, kiu strikte rilatas kun la disvolvigo de fizikkultura kaj sporta afero. En la jaro Ĉinio fondis la unuan instituton pri sportado kaj ekhavis la unuan trupon pri sporta scienca esploro. En la pasintaj 30 jaroj la trupo pli-grandiĝis. Nun en la tuta lando estas 35 tiaj institutoj kun 1 500 laborantoj. En 1980 fondiĝis la Ĉina Sportologia Asocio kaj poste lokaj asocioj, kun 7 000 membroj. Tiuj scienc-esplorantoj okupiĝis pri fundamentaj teorioj, kiaj sporta fiziologio, sporta medicino, sporta biomekaniko, sporta psikologio kaj sporta tekniko kaj taktiko, aŭ iris al trejnejoj kaj konkursejoj por fari enketon kaj esploron kaj akiris ĝojigajn fruktojn. En la Tutlanda Scienc-teknika Kongreso okazinta en 1978, 12 sportaj scienc-teknikaj fruktoj estis premiitaj. En 1985 la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio unuafoje donis progresan premion de sporta scienco kaj tekniko, kaj poste 229 scienc-esploraj fruktoj estis premiitaj, 6 el ili estis premiitaj per ŝtata progresna premio de scienco kaj tekniko kaj 3 per ŝtata inventa premio.

PLIMULTIĜO DE SPORTAJ INSTALAJĴOJ

Antaŭ 10 jaroj en Ĉinio sportejoj multiĝis malrapide. En la lastaj 10 jaroj la stato multe ŝanĝiĝis. En 1988 en Ĉinio troviĝis 615 stadionoj, 476 sporthaloj,

3 400 naĝejoj kaj 520 000 aliaj sportejoj. Tio donis bonajn kondiĉojn por disvolvi amasajn sportajn aktivadojn kaj okazigi gravajn konkursojn.

Ankaŭ en la kamparo konstruiĝis kvanto da sportaj instalaĵoj. La nombro de gubernioj, kiuj havas stadionon, iluminan pilkludejon, naĝejon kaj trejnejon kreskis de 11 en 1982 al 198 en 1988.

Por la 11-a Azia Sportkunveno okazonta en Pekino de la 22-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro ĉijare, Pekino konstruis kaj rekonstruis 46 trejnejoj kaj 33 konkursejoj.

KONSTANTA OFTIĜO DE INTERNACIAJ INTERŜANĜOJ

Post kiam Ĉinio denove okupis en 1979 sian laŭlegan lokon en la Internacia Olimpika Komitato, la sportaj kontaktiĝoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj pli kaj pli oftiĝas. Nun Ĉinio estas membrlando de 73 internaciaj kaj 38 aziaj sportaj organizoj. 152 personoj plenumas oficon en 35 internaciaj kaj 36 aziaj sportaj organizoj. Lastatempe, He Zhenliang, prezidanto de la Ĉina Olimpika Komitato, estis elektita kiel vicprezidanto de la Internacia Olimpika Komitato en ĝia 95-a Kunveno. Ĝis la fino de 1988, Ĉinio 9 000-foje faris sportan interŝanĝon kun 170 landoj kaj regionoj, kio akcelis la ĉinajn sportajn aktivadojn.

La kampo de la teknika kunlaboro inter Ĉinio kaj aliaj landoj pli kaj pli vastiĝis. Ĉinio sendis trejnistojn al 98 landoj kaj regionoj je 900 homfojoj kaj helpis ilin konstrui stadionojn kaj sporthalojn, 38 el tiuj estis uzataj. Pro la kontribuo de Ĉinio al Olimpikoj, s-ro Juan Antonio Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, donis al Ĉinio la plej altan premion "Olimpik-pokalo" en 1986. Kaj krome, 9 ĉinoj estis honoritaj per Olimpikaj Ordenoj. ■

ANTAŬ 69 jaroj, iu rusa blindulo estis ekzilita el Japanio kiel danĝera elemento, partopreninte la manifestacion en la Unua de Majo. Fidela al sia patrujo, li deziris reveni Rusion. Venkinte multajn malfacilojn, li venis de Vladivostoko al Ĉita. Sed tie, li estis atakita de nova malfeliĉo: la registaro malpermesis al li reveni hejmlokon ne koninte liajn kondutojn. Tiel li devigite prenis novan vojon kaj atingis Harbin en nordorienta Ĉinio je la fino de aŭgusto 1921. Li estis neniu alia ol rusa blinda poeto Vasilij Eroŝenko, amiko de la ĉina popolo.

Vivinte unu monaton en Harbin, V. Eroŝenko forlasis la urbon la 1-an de oktobro kaj veturis al Ŝanhajo. La Ŝanhaja E-Asocio fervore akceptis lin. Antaŭ lia atingo, s-ro Hujucz, respondeculo de la asocio, ricevis leteron de iu japana esperantisto, kiu konigis al li la malfeliĉan travivaĵon de Eroŝenko, esperante, ke la Ŝanhaja E-Asocio helpos tiun blindan esperantiston.

La Ŝanhaja E-Asocio okazigis bonvenigan kunvenon por Eroŝenko. En ĝi, li faris emocian paroladon kaj informis al la ĉeestantoj la E-movadon en aliaj landoj. Por la vivtenado li eklaboris en iu masaĝa hospitalo, helpate de sia japana amiko. S-ro Hujucz ĉinigis kaj publikigis liajn poemojn kaj petis lin instrui en la E-lernejo funkciigata de la Ŝanhaja E-Asocio.

Informiĝinte, ke ankaŭ al la Ŝanhaja E-Asocio mankas mono. Eroŝenko proponis organizi koncerton por financi la asocion per ĝia enspezo. Post nelonge, la koncerto estis okazigita. Rusaj, ĉinaj, japanaj kaj koreaj kantistoj faris prezentadojn. Ankaŭ Eroŝenko deklamis sian Esperantan poemon kaj kantis rusajn popolkantojn, mem ludante muzikilon.

La koncerto sukcesis kaj akiris

Eroŝenko kaj la ĉina E-movado

rimarkindan enspezon, per kiu la asocio ne nur elspezis por la ludejo, sed ankaŭ sin liberigis de la ŝuldoj, aĉetis de eksterlande aron da Esperantaj eldonaĵoj kaj fondis malgrandan bibliotekon. La koncerto ankaŭ oferis monsumon al iniciato de "La Verda Lumo", organo de la E-asocio.

La malfacila travivaĵo de Eroŝenko kaj lia malfeliĉo en Japanio vekis atenton kaj simpatian de fama ĉina verkisto Lusin. Kiam li informiĝis, ke Eroŝenko malfacile vivas en Ŝanhajo, li rekomendis lin al s-ro Cai Yuanpei, direktoro de la Pekina Universitato. Tiel, Eroŝenko venis en la Pekinan Universitaton februare de 1922 kaj tie instruis Esperanton kaj rusan literaturon. Tiam lia monata salajro estis 200 usonaj dolaroj.

Ĉar Eroŝenko estis blinda, li ne kapablis aranĝi sian ĉiutagan vivon, s-ro Cai do konfidis lin al Lusin, kiu varme akceptis tiun rusan gaston kaj ofte interparolis kun li en la japana lingvo aŭ akompanis lin en promenado vespere en la korto. Eroŝenko aŭ rakontis siajn travivaĵojn en Rusio, Birmo, Hindio kaj Japanio aŭ ludis sepkordan instrumenton kantante antikvajn rusajn kantojn por esprimi la sopiron al siaj hejmloko kaj parencoj.

La apero de Eroŝenko aldonis novan vivopovon al la Pekina E-movado. En la Pekina Universitato, pli ol 500 studentoj eklernis Esperanton. Kaj krome la

universitato funkciigis postlaboran E-kurson. Dank' al la instruo de Eroŝenko, la lernantoj multe progresis. Pluraj el ili, ekz., Wang Luyan, Chen Shengshu, Feng Xingsan k.a. poste fariĝis elstaraj esperantistoj.

Tiam Eroŝenko faris ankaŭ prelegon pri Esperanto kaj Esperanta literaturo en la Pekina Universitato kaj aliaj altlernejoj. Li ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la ĉina E-movado.

Krom instruado en la Pekina Universitato, Eroŝenko ankaŭ aktive laboris por la Pekina E-Asocio. Li ofte ĉeestis kunvenon de la pekinaj esperantistoj kaj helpis ilin en la lernado de Esperanto. Ĉiusemajne, li iris per ĵinrikŝo al la E-lernejo por gvidi la E-kursojn elementan kaj mezgradan. Tie li laboris pli ol 9 horojn ĉiusemajne. En la 3-a de julio 1922, kiel reprezentanto de la Pekina E-Asocio Eroŝenko partoprenis en la 14-a UK en Helsinko, Finnlando. En la 4-a de novembro, li revenis en Pekinon kaj raportis al la pekinaj samideanoj pri la UK. Poste, li estis elektita kiel sekretario de la Pekina E-Asocio kaj direktoro de la Pekina Esperanta Kolegio.

En Pekino, Eroŝenko aktive partoprenis sociajn aktivadojn. Li ofte ĉeestis kunvenojn de altlernejoj kaj faris paroladon pri sociaj problemoj. En sia parolado li konigis al la ĉina publiko la brilajn atingojn de la rusa literaturo, propagandante ĝiajn de-

mokratian tradicion kaj progresan tendencon. En la parolado li ankaŭ skurgis la ĉinan feŭdisman sistemon kaj militaristan diktaturon, elkore esperante, ke la ĉina popolo sin liberigos el la malnovaj antaŭjuĝoj, malnovaj moroj kaj superstiĉo kaj puŝos Ĉinion al luma estonteco.

La 30-an de januaro 1923, Eroŝenko vojaĝis al Ŝanhajo, Hangzhou kaj aliaj lokoj. En Ŝanhajo, li estis varme akceptita de Hujucz, Hangzhou-aj esperantistoj akompanis lin en vizito al la Okcidenta lago kaj aliaj vidindaĵoj. La 27-an de februaro, li revenis en Pekinon. Tiam, Ĉinio kaj Sovetio jam restarigis la diplomatan rilaton, kaj subite la najtingalo de lia hejmloko revenis en lian memoron. Eroŝenko deziris kiel eble plej baldaŭ reveni en sian patrujon, al kiu li sopiris tage kaj nokte. La 16-an de aprilo 1923, li kun bedaŭro adiaŭis Lusin, liajn familianojn kaj Pekinon por veturi al sia patrujo.

Por memori lian kontribuon al la ĉina E-movado, en 1981 la redakcio de "El Popola Ĉinio" reeldonis lian verkon "Rakontoj de Velkinta Folio". Decembre de 1985, la Ĉina E-Eldonejo refoje presis ĝin. Nun jam elvendiĝis la 7 000 ekzempleroj, kiujn oni presis en 1981 kaj 1985. En 1990, la Ĉina E-Eldonejo refoje eldonos ĝin. El tio, oni facile rimarkos, kiel la ĉina esperantistaro respektas Eroŝenkon kaj amas liajn verkojn. V. Eroŝenko vivos en la koro de la ĉinaj esperantistoj por eterne. ■

ESP-NOVAĴOJ

● Memore al la 40-jara jubileo de "El Popola Ĉinio" (EPC), la 1-an de majo, la Pekina Xiqu-poŝtoficejo emisiis memoran koverton en Esperanto kaj la ĉina lingvo kaj faris memoran stampilon en Esperanto. La projektinto de la koverto estas Wang Yulei de la Centra Nacimalplimulta Instituto kaj tiu de la stampilo — veterana esperantisto Zhang Linrui.

● Por festi sian 40-jaran jubileon, la redakcio de EPC faris 3-specajn kuprajn memorinsignojn. Sur la fono ruĝa, verda kaj blua estas fluganta kolombo, kies flugiloj kaj vosto estas formitaj de la literoj EPC, mallongigo de "El Popola Ĉinio". La insigno signifas, ke la revuo "EPC" pene laboros por mondpaĉo kaj amikeco inter diverslandaj popoloj.

● La Ĉina Pupteatra Trupo, la unua ŝtata pupteatra trupo de Ĉinio, fondiĝis en 1955. Antaŭ nelonge ĝi festis sian 35-jaran jubileon. En la 35 jaroj ĝi prezentis ĉ. 300 teatraĵojn. En la 11-a Internacia Pupteatra Festivalo okazigita en Jugoslavio, 1978, ĝi prezentis mitan pupteatraĵon "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco" en Esperanto, kaj per tio ĝi gajnis la fakan premion, la infanan premion kaj la oficialan apartan premion pro granda lingva laboro farita en tre mallonga tempo. En la 7-a Internacia Pupteatra Festivalo okazigita en Hungario, 1984, ĝi gajnis la superan honoran premion. En la

lastaj 10 jaroj ĝi vizitis Japanion, Francion, Usonon, Kanadon, Brazilon, Tajlandon, Aŭstrion kaj aliajn 3 landojn. Nun ĝi kunlaboras kun la Ĉina E-Eldonejo en la kompilo de Esperanta bildlibro "La Pupteatra Arto de Ĉinio".

● La 27-an de marto, s-ro Xiao Congyun, honora membro de la konsilantaro de la Ĉina E-Ligo kaj tiu de la Ŝanhaja E-Asocio, forpasis pro malsano en sia aĝo de 85 jaroj. S-ro Xiao eklernis Esperanton en la 20-aj jaroj. En 1929, li kaj s-ro Tikos kune fondis la Esperantan Asocion en Hankoŭ. En 1932, li partoprenis en Ŝanhajo la Ĉinan Proletan Esperantistan Union, iniciate starigitan de Hujucz, Lou Shiyi, Ĵelezo k.a., aktive sin jetante en la maldekstran kulturen movadon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, li aktive partoprenis en Ŝanhajo la E-movadon. Li estis konsilanto de ĈEL kaj de la Ŝanhaja E-Asocio.

● Antaŭ nelonge la Ĉina E-Eldonejo eldonis vortaron "Anatomia Nomenklatur" en latino, Esperanto, la angla, franca kaj ĉina lingvoj. La vortaro kompilita kaj tradukita de s-ro Li Kexi kaj d-ro André Albault, prezidanto de la Akademio de Esperanto, havas 697 paĝojn duonoktavajn.

● La Ĉina E-Eldonejo eldonis "Esperanto-Ĉina Vortaro" (la dua eldono), ĉefredaktitan de s-ro Honfan. Ĝia unua eldono aperis en 1987 kaj elvendiĝis post du jaroj. Por perfektigi la verkon kaj kontentigi la bezonon de la esperantistaro, s-ro Honfan faris

revizion en pli ol 200 lokoj ĉi-foje.

● Gernot Ritterspach, en la aĝo de 61 jaroj, forpasis en la 13-a de januaro 1990. Kiel renoma kaj kompetenta spertulo en la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) kaj en la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) li dediĉis sin al Esperanto, precipe al la fervojfaka terminologio 42 jarojn.


● Memore al la Centjara Jubileo de la Bulgara Esperanto-Movado, la Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko de Bulgario emisiis la 23-an de februaro, 1990, memorigan poŝtmarkon kun valoro de 10 stotinkoj. Sur ĝi estas verdstela flago kaj Esperanta teksto: 100 JAROJN ESPERANTO-MOVADO EN BULGARIO. Estis emisiita samtage ankaŭ unuataga koverto kun bildo sama kiel la poŝtmarko.

● Inter la 20-a kaj 25-a de februaro, la Akupunkturista Grupo el Kansajo de Japanio vizitis Ĉinion. La japanaj akupunkturaj specialistoj ĝoje renkontiĝis kun ĉinaj kolegoj de la Akupunktura Instituto kaj faris akademian interŝanĝon. Ili tre kontentis pri la vizito kaj profesie kaj turisme.

La viziton realigis s-ro Yosimi Umeda pere de Esperanto kaj per tio li montris al la akupunkturistoj la praktikan utilecon de Esperanto.

En tiu okazo s-ro Yosimi Umeda ĝoje renkontiĝis kaj interparolis kun la estraro de la redakcio de EL POPOLA ĈINIO.


Memorkoverto por la 40-jariĝo de "El Popola Ĉinio"



Unuataga memorkoverto por 100 jaroj de la Esperanto-movado en Bulgario

Vizito de la Ardea Insulo

Teksto de WEI LIAO Fotoj de LI KAICONG



La Centro de Internacia Ekspozicio Fushan

Alilandaj turistoj en Xiamen



MI forlasis la insulon Xiamen antaŭ ok jaroj. Tie mi vivis kvar jarojn. De tiam, je rememoro pri la urbo, kiun oni nomas Ardea Insulo, du abisme diferencaj impresoj samtempe aperis en mia cerbo.

Xiamen, situanta en sudorienta Ĉinio, estas mezgranda urbo kun 1.06 milionoj da loĝantoj. Estas belega ĝia natura pejzaĝo. La verdaj montoj, blua maro, ĉarmaj ĝardenoj, antikvaj historiaj restaĵoj, belaj floroj prosperantaj en kvar sezonoj, ĉiuj ĉi estas ravaj. Sed la ĉifona aspekto de la konstruaĵoj kaj stratoj malplezurigas vizitantojn. Troviĝis nur unu bonaspekta strato Zhongshan-strato kun longeco de

du kilometroj. Promenante sur tiu plej bela strato de Xiamen, oni ne povis forpeli la impreson ke la belulino jam maljuniĝis.

Tiuj du tute malsamaj impresoj tiel profunde enradikiĝis en mia cerbo, ke mi konsterniĝis, kiam mi ĉifoje revenis al Xiamen kaj vidis harmonie dispoziciitajn etaĝdomegojn en tiu pitoreska urbo.

RENOVIĜO DE LA URBO

Jam antaŭ dek jaroj la ambiciaj Xiamen-anoj komencis fari projekton de sia nova urbo.

Tiam oni decidis ekspluati specialan ekonomian distrikton en Huli, kiu distancas 6-7 kilometrojn for de la urbaj kvartaloj. En 1984, la speciala ekonomia distrikto de Huli disvolviĝis en la specialan ekonomian regionon de Xiamen. Atinginte Xiamen mi rekte veturis al Huli — la naskiĝloko de la speciala ekonomia regiono de Xiamen.

Antaŭ dek jaroj, Huli estis dezerta.

Hodiaŭ, ĝi jam fariĝis nova industria distrikto.

Program-regaj kaj mikrokomunikaj ekipaĵoj importitaj de la Xiamen-a Telefonia Kompanio

Tie ne ekzistas altaj fumbuboj nek bruego de maŝinoj. En Huli disetendiĝas la larĝaj kaj glataj stratoj. Ĉi tie estas pensionoj, vilaoj, drinkejoj, magazeno, hospitalo kaj kulturaj kaj komunikaj servoj. La distrikto nun havas pli ol 70 entreprenojn, kune investitajn aŭ kune administratajn de ĉinoj kaj eksterlandanoj, aŭ sole investitajn de eksterlandanoj. Tiuj entreprenoj produktis unuaklasajn produktaĵojn per avangardaj teknikoj, ekipaĵoj kaj administrativaj metodoj.

La sukcesa konstruado de la industria distrikto en Huli akcelis la industrian disvolviĝon de la tuta urbo. En Xiamen jam formiĝis kompare kompleta industria sistemo kun elektronika, tekstila, manĝaĵa, kemia, meĥanika, konstru-materiala industrioj kiel la ĉefaj. En la tuta urbo ekzistas pli ol 1 000 ĉinaj kaj eksterlandaj entreprenoj. La produktov valoro de la eksterlandaj entreprenoj jam superis 50% de la totala produktov valoro de la tuta urbo. La eksterlandaj investantoj antaŭe venis ĉefe de Hongkong kaj Aomen, nun ili venas de pli ol 10 landoj kaj regionoj de Eŭropo,

Azio kaj Ameriko.

Kun la disvolviĝo de la industrio, rapide progresas la konstruado de la nova urba kvartalo Yundang kaj la nova orienta antaŭurba distrikto. La urbocentro moviĝis norden de la antaŭa Zhongshan-strato.


ĈIAM PLIBONIGITA INVESTA MEDIO

Iu eksterlandano, kiu funkciigas entreprenon en Xiamen, diris al mi: "Jam kvin jarojn mi investis en Xiamen, kies investa medio pliboniĝas ĉiuhore. Tio ĝojigas min kaj firmigis mian memfidon en investo." Dum lia parolado aeroplano Boeing-747 muĝe transflugis super niaj kapoj kaj malaperis en nuboj.

La flughaveno de Xiamen havas 17 aerliniojn en kaj eksterlandajn kaj servas al pasaĝeroj 85 flugfojojn ĉiusemajne. Xiamen kunligiĝas kun aliaj regionoj de la lando per fervojoj kaj ŝoseoj. La Haveno de Xiamen jam fariĝis grava haveno de sudorienta Ĉinio por oceana kaj proksimmara transportado. La haveno kun profundo de pli ol 12 metroj povas akcepti ŝipon de 100 000 toneloj. 50 000-tonelaj ŝipoj povas rekte alboridiĝi. Tie oni povas telefoni rekte al 119 enlandaj urboj kaj 18 landoj en la mondo kaj telegrafi al preskaŭ ĉiuj landoj. La provizado de la urbo je akvo kaj elektro estas sufiĉa.

Estas neforgesebla por mi okazintaĵo: Xiamen estas urbo sur insulo, kie mankis dolĉa akvo. Antaŭ pli ol dek jaroj, kiam mi ekvizitis la Xiamen-an Universitaton, oni provizis la lernejon per akvo nur 1 horon en mateno kaj vespero, en alia tempo oni uzis akvon el putro. Foje, mi ĉerpis akvon el putro, neatente falis kaj perdis al mi unu denton. Ĉifoje mi speciale iris rigardi la puton. Estas ĝojinde, ke la putro estas ne plu uzata kaj siteloj, necesaj siatempe por studentoj, jam malaperis.

PENIGA ENTREPRENADO



Mi vizitis la Komercon Kompanion Limigita de la Xiamen-a Speciala Ekonomia Regiono. Vicestro Huang de la kompanio konigis al mi pri la disvolviĝo de la kompanio, kio donis al mi fortan impreson de lukta spirito de xiamen-anoj.

Tiu kompanio estis establita antaŭ ses jaroj. Tiam, ĝi, sen unu groŝo investita de la ŝtato, havis ne pli ol dek personojn. Ĝi prunteprenis 30 000 juanojn kaj 10 000 usonajn dolarojn kiel kapitalon kaj komencis sian laboron en kabano post simpla inaŭguro per krakigo de petardoj. Post ses jaroj tiu ĉi kompanio fariĝis entreprena grupo kun multaj funkcioj. Ĝi konsistas el 19 fakaj departementoj, 3 subkompanioj, 1 eksterlanda entrepreno, 1 instituto, 9 entreprenoj kune administrataj de ĝi kaj aliaj, 20 eksportaĵo-produktaj bazlokoj. La kompanio, kvankam jam akiris gigantan profiton, neniam perdis sian luktan spiriton de la komenca periodo de sia establiĝo. Ĝis nun la kompanio konservas la kutimon, ke estroj de la kompanio gvidas la laborantojn en ŝarĝado. Post la finkonstruiĝo de la 18-etaĝa ofica domo, oni nur krakigis petardojn por celebri ĝian oficialan uzon.

Krom diligenteco kaj ŝparemo, ĝi havas ankaŭ alian gravan karakteron, t.e. observo de kontraktoj kaj plenumo de promesoj. La kompanio opinias, ke por akiri sukceson en la ekonomia konkurso ne sufiĉas nuraj informoj kaj ŝancoj, oni devas ankaŭ konfidigi klientojn. tio estas la plej grava. En la komenca periodo de la kompanio, iu eksterlanda komercisto helpis la kompanion importi aron da varoj. Sed pro la nedebito, la kapitalo ne bone cirkulis. Tiam la kompanio, preferinte ŝarĝi sin per altkvota interezo de prunteprenita mono, laŭkontrakte pagis al la komercisto la ŝuldon per ĉiuj kontantaj fremdaj valutoj en la mano. Sciinte tion la komercisto estis profunde kortuŝita. Dank' al la leviĝo de prestiĝo de la kompa-

nio, eksterlandaj komercistoj invitis ĝiajn reprezentantojn al Hongkong por trakti komercajn aferojn.

INVESTA VARMO DE TAIWAN-ANOJ EN XIAMEN

En 1988 Xiamen estis sankciita kiel unu el la privilegiitaj urboj de la lando kiuj havas egalrajton kiel provincoj en ekonomia administrado, kaj leviĝis la unua investa tajdo en Xiamen fare de taiwan-anoj.

En la sekvanta jaro la Ŝtata Konsilantaro sankciis la fondiĝon de la speciala ekonomia regiono de Xiamen kaj ĝiajn du distriktojn Xinglin kaj Haicang kiel investan regionon por akceli investadon kaj ekspluatadon de la komercistoj de Taiwan. Kaj tiel en Xiamen aperis la dua investa tajdo.

Sur strato de Xiamen mi renkontis s-ron Fang, kiu venis de Taiwan. Li diris al mi, ke la dilekto, moroj, kutimoj, klimato kaj medio de Xiamen estas samaj kiel tiuj de Taiwan. En Xiamen li sentis ke li estus en sia hejmloko. Tio estas naturdotitaj kondiĉoj de Xiamen por altiri la investon de Taiwan.

Lastjare, Xiamen sankciis sume 131 investajn kontraktojn de taiwan-anoj. La interkonsentita investa monsumo estis 493 milionoj da usonaj dolaroj, interalie la investaĵo de Taiwan estis 480 milionoj da usonaj dolaroj, kiu konsistigis 62.5% de la totala sumo de la enkondukita eksterlanda kapitalo de la urbo en la lasta jaro, kaj la investaĵo de Taiwan en 1989 superis ĉiujn tiujn en la pasintaj jaroj.


Jen la ĝenerala plano pri la ek-




Restoracio, investita de Ĉinio kaj Singapuro, en konstruado

spluatado kaj konstruado de Xinglin kaj Hailen: emfaze disvolvi en Xinglin modernajn tekstilan, kemian kaj konstrumaterialan industriojn por kompletigi la jam ekzistantajn entreprenojn, stimuli la progreson de malnovaj entreprenoj kaj fari ilin entreprenoj de eksportekonomia tipo, disvolvi en Haicang kemian, energian, havenan kaj aliajn kapitalo-kompaktajn industriojn kaj aron da entreprenoj konsumantaj krudajn materialojn produktatajn de la loko, inkluzive de konstrumaterialaj entreprenoj, unuvorte, iom post iom fari la lokajn industriojn malferma sistemo en kiu ĉiuj entreprenoj akceptos, kompletigos unu alian kaj sorbos kapitalon de Taiwan.

Oni diras, ke Xiamen ricevis la nomon Ardea Insulo pro tio, ke la formo de Xiamen-insulo similas al ardeo. Nun, Xinglin kaj Haicang servas kiel ĝiaj du flugiloj, kaj ĝi vere ekflugos. ■




Xiamen




En laborejo de la kompanio Lumel investita de Usono



Kontenerizita kajo



Ponto super maro konstruata



Tradiciaj porcelanaĵoj de Xiamen

Kiam ŝi trovis sakon kun granda sumo...

PLUVETIS tagmeze de la 15-a de januaro ĉi-jare. Li Lingzhen, lavistino de la Canglang-distrikta Popola Hospitalo de Suzhou, kun ombrelo hastis hejmen. Ŝin maltrankviligis ŝia 10-jara filino, kiu dormis en la hejmo kaj ankoraŭ ne prenis matenmanĝon.

Subite falis en ŝiajn okulojn nigra sako. Ŝi levis ĝin kaj laŭte kriis: "Kiu perdis la sakon?!" La krio dronis en pluyado. Sur la strato vidiĝis neniu.

Li Lingzhen tenajle tenis la ombrelon inter la kolo kaj ŝultro kaj pene malfermis la sakon. Ha, plensako da mono! Al ŝi tuj venis la penso: la perdinto certe estas maltrankvilega. Ŝi fermis la sakon kaj kuris rekte al la hospitalo trans la strato, kie ŝi laboris. Ŝi rapide kuris en oficejon kaj diris al respondeculo: "Rapidu! Rapidu! En la sako estas mono, tuj transdonu ĝin al la perdinto!"

Li Lingzhen kaj ŝia filino



La monon antaŭtagmeze elprenis el banko Zhou Xinzong de la Taixing-a Konstrua Kompanio. Estis kvin stakoj da monpaperoj, ĉiu kun dek mil juanoj. Tio estis salajroj kaj premioj de pli ol 200 konstruistoj!

Ĝuste en tiu momento la administrejo de la konstrua kompanio ricevis telefonon de Xujiang-policejo: "Via kompanio perdis grandan sumon da mono, bonvole venu ĉi tien kaj reprenu." Pasis apenaŭ 20 minutoj de post kiam Li Lingzhen trovis la monon surstrate.

La ago de Li Lingzhen vokis grandan eĥon. Multaj homoj opiniis, ke oni ne devas proprigi al si monon ne apartenantan al si mem, ke tiu, kiu tion faris, ne bone dormos, kaj ke Li Lingzhen faris prave.

Ankaŭ Li Lingzhen ne atendis ke traktado de tiu 50 mil juanoj estas ne nur provo al ŝia virto, sed ankaŭ nereakta ekzameno al tiuj, kiuj ne apudestis kaj informiĝis pri la afero poste. Tamen la respondo estas sama: Honesteco estas virto.

Laboristinoj de la Suzhou-a Tekstilejo, kie Li Lingzhen siatempe kune kun ili laboris, fieris pro ŝia faro.

La 34-jara Li Lingzhen devenis de ordinara laborista familio. Aŭdinte laŭdon al ŝia filino, la 70-jara patrino modeste diris: "Ŝi devis tion fari." La plijuna fratino de Li Lingzhen ofte vizitis sian fratinton, sed ŝi eksciis tion de radiodisaŭdigo. Li Lingzhen faris la bonon, sed ŝi neniam menciis tion kaj ŝia familio nur unufoje simple diskutis pri tio ĉe vespermanĝo, post kiam ili eksciis ĝin. Ili ĉiuj opiniis, ke redoni perditaĵon al perdinto estas prave kaj ordinare.

Por esprimi sian dankon la konstrua kompanio pretis donaci mil juanojn al Li Lingzhen, sed ŝi fordankis. Ŝi diris: "Vi pene laboris unu jaron. Prenu la nomon por bone festi la Printempan Feston."

Li Lingzhen estas ordinara laboristino. Ŝia edzo mortis de malsano antaŭ unu jaro. Ŝi vivtenis sian lernevizitantan filinon kaj sin mem per la monata enspezo de malpli ol 100 juanoj. ■

Pri “Tranokto ĉe la Ponto de Acero”

de DI ZI

*La lun' subiras, korvoj krias, prujnas de l' ĉielo,
maldormas mi kun fiŝistlum' ĉe l' Ponto de Acero.
De Templo Hanshan ekster Gusu* venas jen sonado
de sonorilo en noktmez' al mia ŝip-hotelo.*

La poemo estas verkita de Zhang Ji, poeto de la meza periodo de Tang-dinastio, kiu sukcesis trapasi la imperiestran ekzamenon kaj funkciis kiel ŝtatoficisto en regiono sude de Yangzi-rivero en Tianbao-erao (742-756 p.K.). En profunda aŭtuno lia boato haltis apud la Ponto de Acero kaj li tranoktis en la antaŭurbo de Suzhou. Ĉe la noktomezo la lunarko jam subiris kaj korvoj sur arboj gakis de tempo al tempo. Tra griza nebulo trembrilis lamplumo de fiŝistaj boatoj. La kvietaj medio multe logis la migrantan poeton kun melankolio. Je la momento eksonis sonorilo en Hanshan-templo, kio kreskigis al la poeto nepriskribeblan senton.

Hanshan-templo estas je 0.5 km okcidente de la Ponto de Acero. En ĝi iam vivis poeto-bonzo Hanshan en la unuaj jaroj de Tang-dinastio. Tial la templo ricevis la nomon. Kun la antikva templo la pejzaĝo de la Ponto de Acero des pli ĉarmas. Ĉu pro la beleco de la Ponto de Acero, aŭ pro la poemo de Zhang Ji, nun la sonorado en Hanshan-templo noktomeze allogas al si multajn turistojn.

Pentristo Zheng Shufang lertas fari gravuraĵojn kaj ankaŭ ŝatas pentri tuĉajn pejzaĝojn. Li estas sudano kaj bone konas la pejzaĝojn de Suzhou. Tial la sud-ĉinia pejzaĝo farita de li por la poemo estas viveca: Antaŭ ni prezentigas bildo de la rivero kaj la rigardanta al ĝi Hanshan-templo. La branĉoj, rekte interplektiĝantaj, reliefigas la prujn-grizan ĉielon kaj zigzagan riveron sub la ponto. La balanciĝanta boato plifortigas la poezian etoson.

Su Shi estas fama kaligrafo. La kaligrafaĵo farita de li estas bela kaj glata en strukturo kaj en peniko. ■

* Gusu — alia nomo de Suzhou. Sudokcidente de la urbo estas Gusu-monto, tial oni nomas la urbon Gusu.


月落烏啼霜滿天
江楓漁火對客愁
眠到客船船外
寒山寺夜半鐘聲

張繼詩
楓橋夜泊
蘇適於北京

Kaligrafaĵo de Su Shi



Pentrajo farita de Zheng Shufang por la poemo



Raraj ŝtongravuraĵoj de Han-dinastio

SUDE de la gubernia urbo Jiaxiang de Shandong-provinco troviĝas ŝtongravuraĵoj de la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.). Ili estis tombaj ornamaĵoj konsistantaj el paro da ŝtonaj pavilonformaj steleoj, paro da ŝtonaj leonoj kaj 44 ŝtonplatoj kun bildoj venintaj de 4 familiaj temploj. Ili ĉiuj estas frutempaj ŝtongravuraĵoj de Ĉinio.

Sinjoro Zhu Xilu, kiu zorgas pri protektado de tiuj historiaj objektoj, konsciencie protektis tiujn gravuraĵojn en la pasintaj 22 jaroj. Li absorbiĝe esploris ilin, aperigis plurajn verkojn kaj fariĝis fakulo pri Han-dinastiaj

ŝtongravuraĵoj.

Sinjoro Zhu diris al mi: “En Han-dinastio ĉi tie estis potenca familio Wu, kies membroj de pluraj generacioj estis lokaj alt-ranguloj. Inluate de la moro de luksa sepultado, la familio konstruigis por si grandan tombejon. Dank’ al la zorgo kaj protektado de intelektuloj dum multaj jarcentoj, la tombejo estis bone protektita.”

En la ekspona ĉambro staras la paro da ŝtonaj pavilonformaj steleoj, paro da leonoj, kaj ĉirkaŭe estas ŝtonplatoj kun gravuraj bildoj servantaj antaŭe kiel muroj de familia templo. Sinjoro Zhu diris, ke la ŝtonaj gravuraĵoj an-


taŭ Han-dinastio estis malmultaj. En Han-dinastio leviĝis la unua alta tajdo de ŝtona gravurado: Aperis tra la tuta lando ŝtonaj steleoj, tridimensiaj ŝtonaj gravuraĵoj kaj plataj ŝtonaj gravuraĵoj. Inter ili la plej rimarkindaj estis plataj gravuritaj ŝtonoj. Karesante ŝtonan platon, s-ro Zhu diris al mi, ke por fari ĝin oni devis unue poluri la surfacon



Ŝtona leono



Ŝtona pavilonforma steleo



Ŝtonplato kun bildo sur templa muro

de ŝtono, ĉizi sur ĝi intajlan konturan linion de figuroj, poste fortranĉi maldikan tavolon de la surfaco ekster la figuroj por elstarigi la konturojn kaj gravuri intajlajn liniojn sur la figuroj por fari pli delikatan nuancon. Oni nomas tiun gravuran metodon ebena bareliefo. La ŝtonplatoj kun ĉizitaj bildoj en la Templo de Familio Wu havas delikatajn kaj fluecajn liniojn kaj altan gravuran teknikon, ili estas raraĵoj de Han-dinastiaj ŝtonplataj bildoj de Ĉinio.

Pro troa grandeco de la ŝtonaj platoj, la gravuristoj faris la bildojn kun malsamaj enhavoj unu post alia. Mi rimarkis, ke sur la plej supra parto estis dioj, kuriozaj birdoj kaj bestoj. En Han-dinastio budhismo ne havis tre gravan influon, la dioj en la bildoj venis el ĉinaj mitoj. En unu tre viveca bildo oni gravuris tondran ĉaron kun nuboj kiel radoj, kiun ŝnure tiras kelkaj feoj kun du flugiloj sur iliaj ŝultroj. Sur la ĉaro metiĝas du tamburoj, la tondra diino senĉese frapas ilin ambaŭmane per frapiloj, la tambura sono estas tondro, post ŝi dio staranta sur nubo blovas per larĝe malfermita buŝo. Li estas venta dio, lia blovo estigas venton.

Longharulo antaŭ la ĉaro elverŝas akvon el botelo, tiu estas pluva dio kaj faras pluvadon. Apude estas tri homoj enmane kun martelo kaj ĉizilo, kies reciproka frapado estigas fajrerojn, tio estas fulmo. Tiu mita bildo spegulis la imagon de antikvuloj pri la naturaj fenomenoj.

La historiaj personoj en la bildoj estas plej rimarkinda parto el la ŝtonplataj bildoj de la Templo de Familio Wu. Sinjoro Zhu bone konas la personojn en la bildoj, li povas eldiri la nomon de reĝoj, korteganoj, vasaloj, bonaj filoj, justamaj virinoj, armitoj kaj sikarioj en ili kaj rakontojn pri ilia aktivado en la bildoj. Fingromontrante du figurojn kun homa kapo kaj serpenta korpo, li diris: "Ili estas Nūwa kaj Fuxi, la plej fruaj prapatroj de la homaro en mito." Montrante la homfigurojn en reĝaj vestoj post ili, li diris: "Tiu, en ĉapo kun posten-klinita tabuleto, estas Zhu Rong, unu el la tri reĝoj; tiu enmane kun fosilo en fosado estas Shennong; tiu, kun la dekstra mano ĉe la talio kaj la maldekstra mano leviĝanta supren, estas Huangdi, la fondinto de la ĉina nacio; post li staras lia nepo Zhuangxi kaj lia pranepo

Diku; pli poste estas Yao, li aspektas kiel Huangdi. Legendo diras, ke li estas humana kaj saĝa kiel dio, li estis saĝa gvidanto. Shun aspektas same kiel Yao, ankaŭ li estis saĝa reĝo. La reĝo Yu de Xia-dinastio surkape portas kontraŭ-pluvan bambuan ĉapelon, enmane tenas fosilon. Li subigis superakvon kaj per tio faris grandan meriton por la popolo. Nur la lasta reĝo Jie de Xia-dinastio sidas sur du virinoj, tio montris, ke li estis diboĉema tirano."

El la ŝtonplataj bildoj troviĝas ankaŭ multaj scenoj spegulantaj la realan socian vivon, ekz., vizitadon al respektindaj personoj, vojaĝon en ĉaro aŭ rajdo, festenan gastigadon, dancadon akompanatan de muziko, spadan lukadon, militadon, pavilonojn kaj pontojn, agrikulturadon, ĉasadon, buĉadon de koko kaj hundo, ĉerpado, knedon, hejtadon kaj kuiradon. Ili spegulis diversan socian staton, moron, kutimojn, kodan sistemon, religian kredon ktp de la Orienta Han-dinastio. Ili estas ne nur belaj artaĵoj de la Orienta Han-dinastio, sed ankaŭ valoraj materialoj por esplori la politikon, militan aferon, ekonomion kaj kulturon de tiu periodo. ■



Zhang Jinbiao en pentrado

SHI SIWEI:

Zhang Jinbiao, pentristo de

PANDO estas rara besto de la mondo kaj rigardata kiel ŝtata trezoro de Ĉinio. Nun pando estas difinita kiel simbolo de feliĉo por la 11-a Azia Sportkunveno okazonta en Pekino, septembre de 1990.

Ŝanhaja pentristo Zhang Jinbiao famiĝis pro pentrado de pando. En la lastaj jaroj liaj pentraĵoj de pandoj estis eksponitaj en- kaj eksterlande, ke milionoj kaj milionoj da homoj havis la ŝancon vidi tiun "superstelon".

Zhang Jinbiao estas pli-ol-50-jara. Li diplomigis el la fakultato de la ĉina pentrarto de la

Belarta Instituto de Zhejiang-provinco. Li estas sukcesinto en pentrado de homoj, pejzaĝoj, floroj kaj birdoj. Lia pentrado de pando komenciĝis en 1972. Tiujare s-ro R. Nixon, prezidento de Usono, vizitis Ĉinion kaj la ĉina registaro donacis al la usona popolo paron da pandoj. Li pentris pandojn sur du paperfolioj kaj montris ilin en iu vendejo de kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj. La du pentraĵoj ne estis vendaĵoj, sed multe da elmigrintoj kaj fremdlandanoj tre volis aĉeti ilin. Pro tio Zhang Jinbiao komencis pentri pandon ekskluzive.



pando

En la lastaj dekelkaj jaroj, por pli bone koni la vivon de pando kaj observi ĝiajn diversajn pozojn, Zhang Jinbiao ofte vizitis cirkon. Krome li ankaŭ faris skizojn en zoo kaj vizitis la rezervejon Jiuzhaigou en Sichuan-provinco, kie li faris centon da fotoj pri pandoj libere vivantaj en la naturo.

Li faris milojn da pentraĵoj pri pando. Inter ili estis granda peco kun la titolo "Prospero", super kiu li laboris du jarojn. La pentraĵo en longo de 4 metroj kaj larĝo de duonmetro surhavas 99 pandojn en malsamaj pozoj: Iuj estas

amuzigantaj, aliaj distrigantoj, triaj grimpantaj, kvaraj kviete sidantaj...

En la lasta septembro s-ro Zhang Jinbiao ĉeestis la inaŭguron de ekspozicio de liaj pandoj, kadre de la Tokia Semajno de Protekto de Raraj Animaloj. Recenzisto de japana ĵurnalo opiniis, ke s-ro Zhang personigis la pandojn en natura stato, ke la bestoj elspirantaj amindecon kaj gajecon apelacias al la homaro, ke ĉi tiu protektu pandojn, kies nombro estas nur mil sur la ter globo. ■



EN la aromo de lotusfloroj nia aŭto malrapide veturis laŭ alta ĉirkaŭmuro kaj, trapasinte du ferajn pordojn, eniris en la malliberejon "75-a Filio" ĉe Weishan-lago, Shandong-provinco.

La gvidanto de la malliberejo Liu Mengdong la unua manpremis kun mi, kiam mi elaŭtigis. Li estis mezaltastatura, grizhara, facile alirebla kaj pardonema maljunulo. Li estis altklasa inĝeniero de la fako de karbo-elfosado. Li malpermesis al siaj subuloj bati, insulti, korpe puni, humiligi kaj mokridi la transformatojn anstataŭ rezona edukō. Liu Mengdong diris al mi: La loko riĉas je karbo. La malliberejo sidanta en la karbamineja regiono ankaŭ povis esti rigardata kiel karba minejo, kie laboras 2 800 malliberuloj. Ili produktis 400 000 tunojn da karbo jare kun profito de 5 milionoj da juanoj. Ankaŭ la malliberuloj ricevis altan monan premion ĉiunmonate. Foje antaŭ Printempa Festo ili sendis al siaj familioj sume 360 000 juanojn. Por karboelfosado necesas teknikistoj. Tial elekti Liu Mengdong, karboelfosan fakulon, kiel gvidanton de la malliberejo estis konvene.

Mi vizitis la malliberejon, akompanate de Liu Mengdong, kaj trovis, ke la arango de ĝiaj konstruaĵoj similas al granda lernejo. Ĝi havas siajn instruajn etaĝdomojn, ofican etaĝdomon, porloĝajn etaĝdomojn, bibliotekon, legoĉambron, fermcirkvitan televidan sistemon, elektrajn instruajn instalaĵojn, sportejon, hospitalon, manĝejon ktp. Same kiel ekster la alta muro ankaŭ tie regis verdaĵoj kaj floroj kaj ĉio estis en bonordo.

Tie ĉiujare oni liberigis aron da malliberuloj. Post la transformado en la malliberejo plejparto de la antaŭaj rabistoj, ŝtelistoj, ĉantaĝistoj, friponoj kaj murdistoj fariĝis homoj utilaj al la socio, interalie iuj eĉ fariĝis avangarduloj, laborejaj estroj, lertuloj de teknika reformo, vilaĝaj instruistoj k.a. Kompreneble, ankaŭ estis tre malmultaj kiuj ne transformi-

Malantaŭ la muro de malliberejo

de HOU JUELIANG

ĝis kaj denove fariĝis krimuloj.

Kiel la krimuloj akiris la duan vivon malantaŭ la alta muro? Trejnisto Tian Fulin konigis al mi, ke ili prenis tri ĉefajn metodojn.

EDUKO LAŬ KONKRETAJ STATOJ

Tian Fulin diris: Transformi krimulojn fakte estas transformi iliajn malbonajn ideojn; krimuloj diferencas inter si kaj ankaŭ iliaj malbonaj ideoj, tial ni ne devas simple preni saman metodon, sed male, fari edukon al ili laŭ iliaj konkretaj statoj.

Post la morto de la gepatroj la krimulo Yang Xinglin malpaciĝis kun siaj pliaĝa frato kaj bofratino, la lastaj ne zorgis pri la vivo de li kaj lia malpliaĝa frato, tiel ke ili troviĝis en senelirejo. Li fariĝis barbara kaj batalema vagulo kaj fine ŝtelisto. Li estis kondamnita al 4-jara malliberigo.

En la malliberejo, komence li ŝuldis sian krimon al la vilaĝaj kadroj, ke ili ne zorgis pri liaj vivmalfaciloj, kaj planis venĝi sin


al ili. Li kompatis sian malpliaĝan fraton ĉien vagantan kaj planis ĉiamaniere ŝteli por ke li havu sian familion.

Kontraŭ tiu penso de Yang Xinglin, la administrantoj de la malliberejo edukis lin pri la leĝoj, sciigante ke la leĝoj malpermesas perfortan venĝon, kaj ke oni ne devas forgesi la leĝojn kaj agi arbitre. Post la eduko Yang Xinglin forlasis la planon de venĝo. La administrantoj faris al li ankaŭ la edukadon pri la koncepto de vivo, por ke li komprenu ke ĉiu homo devas sin vivteni per sia laboro, ke mallaboremo, parazitado, egoismo, ŝtelado kaj rabado, ĉiuj estas hontindaj kaj riproĉindaj kaj sindediĉo kaj sinoferemo estas noblaj. Tiuj frazoj tuŝis la koron de Yang Xinglin, ke li malleviis sian kapon kaj unuafoje sentis honton.


Post la efika edukado de la administrantoj Yang Xinglin ekkomprenis, ke li krimis pro nescio de la leĝoj kaj mallaboremo, li kordoloris pro sia pasinteco. Post 4-jara transformado li tute aliĝ-

Malliberuloj lernas teknikon.





Tian Fulin (maldekstre) kaj malliberuloj



En pilkoludo

is. Liberigite, li venis al sia vilaĝo kaj rehejmigis sian vagantan malpliagan fraton por kune vivi kaj li amike kunekzistis kun la kadroj de la vilaĝo. Kvankam Yang Xinglin vivis ankoraŭ malfacile, tamen li ne plu ŝtelas. Poste, li kaj lia malpliaga frato sin vivtenis per vendo de ŝafoj kaj ŝafaĵo. Dank' al la pena laborado ili riĉiĝis. Li konstruigis novajn loĝdomojn kaj edziĝis. Lia frato jam fianĉiĝis. Retrospektive al sia pasinteco li kare memoris la malliberejon, kiu donis al li la duan vivon, kaj ĝiajn administrantojn, kiuj montris al li la vivvojon.

CENT-POENTA EKZAMEN-SISTEMO

Por instigi la krimulojn aktive sin transformi, la malliberejo elfaris la "Cent-poentan ekzamen-sistemon", en kiu estis difinitaj ok normoj por ekzameni la kondutojn de la malliberuloj. La normoj estis: konfeso de la krimoj kaj obeo al la leĝoj, observo de la disciplinoj de la malliberejo, lerno de politikaj, kulturaj kaj teknikaj scioj, higieno, taskoplumado, kvalito de laboro, sekureco en produktado kaj konsumo de materialoj.

Oni faris al la malliberuloj ekzamenon ĉiumonate. Se la totala poentaro de la ok flankoj de malliberulo atingis 100, li do trapasis la ekzamenon. Se li akiris poentaron de pli ol 100, li ricevis premion; se li ne atingis 100 poentojn, li estis punita. Estis materiala premio kaj premio de mallongigo de puntempo. Ĉiu plia unu poento signifas mallongigon de puntempo je 1 tago. Se la tota-

la poentaro de malliberulo superis la postulatan poentaron je 120, li ricevis grandan premion. Kiam malliberulo trifoje gajnis tian premion, li rajtis ĝui mallongigon de puntempo je kvar monatoj. Se malliberulo akiris meriton en forigo de danĝero subtere, savo de homoj, solvo de teknikaj problemoj k.a., li ankaŭ estis premiita per mallongigo de puntempo. Se malliberulo estis maldiligenta en laboro kaj lernado, kaj lia totala poentaro ne atingis 100 en tri sinsekvaj monatoj, li estis rigore kritikita aŭ enkarcerigita.

La ekzamena sistemo montris klarajn kaj rigorajn postulojn al ĉiu malliberulo kaj sekve estis rimedo de rigora administrado de malliberejo. La malliberuloj ĝenerale volonte akceptis la ekzamenan sistemon pro tio, ke ĝi donas al ili ŝancon de mallongigo de puntempo. En la lastaj du jaroj oni donis al 1 150 malliberuloj la premion de mallongigo de puntempo aŭ de kondiĉita liberigo.

KUNHELPO EKSTER LA MURO

Malliberuloj timis, ke la socio diskriminacios al ili kaj estos malfacile havigi al si laboron post sia liberigo kaj ke la parencoj malestimos ilin. Iuj malliberuloj plej timis eksedziĝon.

Por solvi la problemojn maltrankviligantajn la malliberulojn kaj por ke ili povu trankvile sin transformi en la malliberejo, la administrantoj de la malliberejo iniciative vizitis la unuojn, kie la malliberuloj antaŭe laboris, la lokajn registarojn kaj iliajn familianojn por ke ili kunhelpu en edu-

ko de la malliberuloj, malgraŭ lacigo, malfaciloj en longdistanca vojaĝo. Tiel, kuniĝis la du transformantaj fortoj ambaŭflanke de la alta muro de la malliberejo. La estroj de la malliberejo subskribis interkonsenton kun najbaraj lokaj registaroj. La interkonsento difinis, ke la malliberejo respondecas pri la transformado de la malliberuloj, ke ili fariĝu honestaj homoj, kaj la lokaj registaroj respondecas pri dono de laborpostenoj al ili kaj solvo de malfaciloj de iliaj familioj. La ceremonion de la subskribo de la interkonsento ĉeestis ĉiuj malliberuloj kaj la enhavo de la interkonsento estis publikigita.

Dank' al la kuna edukado ambaŭflanke de la alta muro, la malliberuloj skribis garantiatajn leterojn al siaj familianoj, ke ili faros meriton por mallongigo de la puntempo, kio profunde kortuŝis iliajn familianojn, ke ili prenis ĝustan sintenon al la malliberuloj: malami krimojn, savi la krimfarintojn. Repreninte la eksedziĝan proceson en juĝejo, la edzino de malliberulo Wang Xinzhu, kun helpa kaj eduka plano kaj vivbezonaĵoj, venis al la malliberejo por viziti sian edzon. Kun profunda sento ŝi diris al la administrantoj: "Mi atendas Xinzhu, ĝis li estos liberigita, se nur li akceptos la edukadon kaj transformadon kaj faros meriton por mallongigo de puntempo." Aŭdinte tiujn vortojn de sia edzino, Wang Xinzhu aktive lernis kaj laboris, por fariĝi bonulo en la malliberejo kaj reakiri sian perditan liberecon. ■

DU JIAN kaj ZHANG MEI:

Hejmo de pentristoj



Ge Yan en pentrado

NE estas ĝuste nomi ĝin hejmo de pentristoj, ĉar en ĝi estas ne nur pentristoj, sed ankaŭ poetoj kaj kaligrafoj. Estas tamen trafe nomi ĝin hejmo, ĉar tie regas ne nur arta etoso, sed ankaŭ varmece kaj intimeco senteblaj nur en hejmo. La hejmo estas la Pekina Qingyun-a Societo de Poe-

toj, Kaligrafoj kaj Pentristoj.

La oficejo de la societo lokiĝas en la hejmo de ĝia estro s-ro Feng Yiwu, prestiĝa erudiciulo en la ĉinaj kulturaj rondoj. En la fruaj jaroj li fondis ĵurnalon kaj instruis, poste li laboris super la ĉina klasika literaturo kaj havis grandan progreson en la kampoj

de tradiciaj poezio, kaligrafio, teorio pri kaligrafio k.a. Li estas grandaĝa, temen li sin ekzercas per kaligrafado ĉiutage frumatene. Laŭ li, kiel lernado ĉiutage, kaj plie, kaligrafi side aŭ stare kun koncentrita atento estas kva-zaŭ fari *ĉigong*-ekzercon aŭ *tajĝičuan*-ekzercon. Eble ĝuste

En la ekspozicio okazigita de la Pekina Qingyun-a Societo



Feng Yiwu kaligrafas



profitante de kaligrafado, s-ro Feng, kun ruĝaj vangoj, parolas sprite kaj pensas klare. Li diris, ke iuj amikoj de kaligrafiaj kaj pentrartaj rondoj ofte venas al lia hejmo por verki poemojn kaj fari kaligrafiajn. Nemalmultaj tiuflankaj amatoroj venas lin konsulti. "Se tiel, kial do ne fondi societon de kaligrafoj kaj pentristoj?" Ekhavis la ideon li kaj liaj kolegoj. En 1984 naskiĝis la Qingyun-a Societo de Poetoj, Kaligrafoj kaj Pentristoj, kun 20-30 membroj.

Pasis ses jaroj, kaj la societo jam havas 831 membrojn, kiuj laboras en pli ol 40 urboj de la lando. Parolante pri la spertado dum tiuj jaroj, s-ro Feng kaj liaj kolegoj estis tre emociitaj. La societo estas spontanea amasa rondo, ĉio devas esti solvita de ili mem. Komence, ili ne havis monon nek aktivejon. Sekve, du el la tri ĉambroj de la hejmo de s-ro Feng fariĝis oficejo de la societo. Poste, ili kunlabore kun aliaj eldonis la bildlibron kun poeziaĵo "Granda Muro". Ĝi estas la unua bildlibro eldonita de la societo post ĝia fondiĝo, kaj per tio la societo gajnis monon necesan por venki malfacilojn.

Inter la membroj de la societo estas multaj fakuloj, tamen la plejparto estas amatoroj de poezio, kaligrafio kaj pentrarto, kaj plie, 80% el ili estas maljunuloj. Maljunulo Huang Yi diris, ke li estas emerita kadro kaj vivas bone. Post emeritiĝo li restis hejme senfare, kaj li pasigis tempon en kart- kaj ŝak-ludoj. Post longa tempo li tediĝis de tio. Li aniĝis al la societo kaj sentis la vivon interesa. Inter la membroj ne mankas homoj, kiuj havas saman sperton kiel Huang Yi. Ili diris, ke ili ekŝatis kaligrafadon kaj pentradon en sia juneco, sed ne havis tempon por tio. Post emeritiĝo ili ekhavis tempon, sed kie tion fari? Kiu aprecos iliajn verkojn? La Qingyun-a societo prezentis al ili bonan ŝancon, tiel ke la maljunuloj, kiuj ne volis pasigi tempon en kart- kaj ŝak-ludoj, aĉetado de legomoj kaj preparado de manĝo, finfine trovis sian novan okupon.

Kaligrafio kaj pentrarto de Ĉinio havas longan historion kaj estas ĉiam rigardataj kiel eleganta afero. Pentrado kaj kaligrafado donas al homoj ĝuon de beleco. Jen kial multaj maljunuloj

pentras kaj kaligrafas absorbite. Iu maljunulino diris, ke ŝi lernas tri studobjektojn, dungas guverniston por si, kaj preskaŭ per ĉiom da monata enspezo aĉetas paperon, penikojn kaj farbojn. Iuj maljunuloj malsanetaj ne nur altigis sian artnivelon, sed ankaŭ fariĝis gajaj kaj sanaj post aniĝo al la societo. Ili diris, ke ili kvazaŭ forgesas ĉion dum pentrado.

La pli-ol-70-jara Ge Yan, estrino de la sekcio de ĉinstila pentrarto, lertas en pentrado de pejzaĝoj. Pentrinte 1-2 horojn, ŝi eĉ ne sentas lacon. Mi informiĝis, ke la tasko de la societo estas ĉefe altigi la nivelon de la membroj. La societo invitas fakulojn doni lekciojn en difinita tempo, ofte okazigas kunsidon, ekspozicion kaj faras kulturalan interŝanĝon. Ĝia membro s-ro Xue Linxing aranĝis individuan bildo-ekspozicion en Japanio. Krome ĝi ankaŭ organizis aktivadon por donaci pentraĵojn al la 11-a Azia Sportkunveno.

Iun tagon de aprilo, ni venis al la Kultura Palaco de Laboruloj, kie okazis ekspozicio de 300 verkoj de membroj de la societo. La verkoj figuras homojn, florojn, birdojn kaj pejzaĝojn en diversaj stiloj, dense tuĉitajn aŭ elegante kolorigitajn. La kaligrafiaĵoj en malsamaj skribsistemoj imponas kiel dancantaj drakoj. Respondeculo pri la kaligrafia sekcio Tang Lihua konigis, fingre montrante kaligrafiajn de Li Dapeng, ke liaj verkoj, kiel valoraĵoj, estas kolektitaj de nemalmultaj alilandaj eminentuloj. La verko ĉe la flanko estas farita de mezaĝulo Zhang Kaigang. Ĉiutage li komencas ekzercadon de kaligrafado kaj pentrado je la 5-a matene.

Ekstere de la eksponejo forte ventis, sed ankoraŭ venis al ĝi multaj membroj, inter kiuj troviĝis junuloj kaj ankaŭ maljunuloj 60-70-jaraj. Enirinte, ili salutis siajn kolegojn kaj serĉis siajn verkojn. Ili interŝanĝis opiniojn pri siaj verkoj. En la ekspozicio regis plena vigeleco. ■

Li Dapeng kaligrafas.



● La baseno de Yangzi-rivero estas grava agrikultura bazo de Ĉinio kaj ankaŭ regiono de bone disvolvita industrio. Por plibonigi la ekologian medion de la loko, en 1990 oni komencis kompletan konstruadon de forstozonoj en la meza kaj supra basenoj de Yangzi-rivero. La unuaperioda projekto plenumiĝos en la jaro 2000, kaj tiam la areo de la forstoj kreskos je pli ol 6 milionoj da hektaroj.

● La ŝipo "Berlino Ekspreso", kun 31 000-ĉevalpova dizelmotoro produktita de Ŝanhajo kiel sia ĉefmotoro, estis lanĉita la 8-an de aprilo kaj veturis el Huangpu-rivero. Oni transdonis ĝin al trafika entrepreno, la plej granda en FR Germanio. Tio markas, ke la ĉina ŝip-industrio suriris la plej altan ŝtupon de la monda ŝipkonstruado.

Al la ŝipo oni aplikis pli ol 50 internacie avangardajn teknologiojn. La ŝipo, 233.9 metrojn longa, 32.2 metrojn larĝa kaj 18.8 metrojn alta, havas 2000 aŭtomatajn kontrolajn arangaĵojn kaj 2 centrajn sistemojn. Dank' al komputila regado, unu homo jam sufiĉas por stiri.

● En Ĉinio lerta komputisto jam povas pli rapide klave enskribi ĉinajn ideogramojn ol latinajn literojn. Tio montras, ke la tiuflanka tekniko de Ĉinio estas avangarda en la mondo.

● Por reaperigi la antikvan aspekton de Pekino, la ĉefurbo de kvin ĉinaj feŭdaj dinastioj, oni decidis bone konservi, krom iuj tradiciaj loĝdomoj kun korto meze, ankaŭ Nanchizi, Beichizi, Nanchangjie, Beichangjie, Niujie, Dazhalan, Liulichang kaj aliajn kvin stratojn.

● La Higiena Ministerio de Ĉinio informis, ke en 1992 Ĉinio limigos infanan paralizon en ĉ. 100 kazoj kaj likvidos ĝin en 1995.

● 113 hospitaloj en 20 ĉinaj provincoj kaj municipoj uzas korajn valvojn faritajn de Ĉinio, ke 3 500 gravaj malsanuloj reakiris novan vivon. Ĉinio estas la dua lando (nur post Usono), kiu povas fari korajn valvojn.

● Senekzemple naskiĝis en Ĉinio trigemeloj de kaprino post ekstera heterofekundigo fare de la Nordokcidenta Agronomia Universitato. Ĝis nun, simila fekundigo sukcesis nur en Hindio.

● Bone funkcias angio farita de la Suzhou-a Medicina Instituto de Jiangsu-provinco. Ĝi, kvarone dika kiom alumeto, estas la plej maldika tia angio en la mondo.

● En Fuqing-gubernio de Fujian-provinco oni skulptis la plej grandan ŝtonan incensujon en la mondo, kun alto kaj diametro ĉiu de 1.8 metroj kaj pezo de 6 tunoj. Kiam incenso brulas en ĝi, la fumo eliĝas samtempe el la buŝoj de 9 drakoj kaj 8 leonoj reliefe skulptitaj ekstere de ĝi.


● Lastatempe la Ŝanhaja Fabriko de Sunenergiaj Piloj produktis novan sciencan ludilon — serion da robotoj "Kalejdoskopa Mondo" — en kombino de akustiko, optiko kaj elektro. Tia ludilo, ne nur amuza, sed ankaŭ instrua, jam venis en la merkaton kaj plenigis blankon en la ĉina ludila industrio.

● La Pekina Observatorio anoncis, ke ĝis nun Ĉinio akiris pli ol 80 specimenojn de aerolitoj, inter kiuj estas la plej mondfama aerolito de Jilin kaj la fera aerolito de Xinjiang, konata kiel la tria granda fera aerolito en la mondo. Ĉinio akiris ankaŭ brilajn sukcesojn en esplorado de aerolitoj, ekzemple, oni trovis en la aerolito de Jilin pli ol 40 ercojn kaj aliajn organikajn kombinaĵojn.


● Antaŭ nelonge aperis la mirakla spektaklo "sep haloj ĉirkaŭ la suno" super Maerkang, urbo en okcidenta Sichuan-provinco. Tiuj haloj de malsamaj koloroj brilantaj ĉirkaŭ la suno malaperis post tri horoj. Loka centjarulo diris, ke tian fenomenon oni antaŭe ne vidis.

● Antaŭ nelonge super la ĉinaj provincoj Sichuan, Hubei, Hunan kaj Jiangxi aperis ia "flugaĵo". Esplorantoj de Zijinshan-observatorio observinte asertis, ke la fenomenon kaŭzis unu-tuna falstelo, kiu trairis la atmosferon de okcidente orienten, pli ol 10

La ŝipo "Berlino Ekspreso"



Sur Liulichang-strato



PLUMO

BLANKA cigno flugis milojn da kilometroj por vintri en sudo.

Unu el ĝiaj plumoj laŭte kriis: "Ne plu flugu, ne plu! Mi estas tre laca."

La blanka cigno diris, kunfrapante la flugilojn: "Sed por vintri ni nepre devas flugi suden!" Ĝi do daŭre flugis kontraŭ vento.

La plumo kriegis denove: "Mi ne flugos, mi volas malsupreniĝi!" Je la krio la plumo falis malsupren al arbaro, de sur la korpo de la blanka cigno.

"Kiu vi estas? De kie vi venis?" unu el la falintaj folioj demandis la plumon.

"Eĉ min vi ne konas!" respondis la plumo per tirata voĉo. "Mi estas — plumo — de blanka cigno — fluganta en la ĉielo!"

"Aĥ, vi estas plumo. Kial vi falis sur la teron?" demandis la folio.

"Vi ja ne scias, kiom laciga estas flugado. Mi flugis jam milojn da kilometroj. Nun mi estas laca kaj volas ripozi sur la tero," fiere respondis la plumo kaj ekdormis.

Ĝi dormadis tri tagojn kaj tri noktojn. Post tio malaperis la laco. La plumo stariĝis kaj diris al la falintaj folioj: "Mi ne povas longe resti ĉi tie. Ĉu vi ne volus viziti aliajn lokojn?"

La folioj rigardis unu alian, kaj neniu el ili sciis kiel respondi. En tiu momento ekblovis vento. Kaj la vento levis la plumon kaj portis ĝin al proksima plaĝo. La plaĝo estis tiel ebena kiel papero. La plumo ekpensis: Poeto verkas poemon ja per plumo. Kial mi ne verkas poemon per mi mem? Post nur tri sekundoj la plumo verkis

jenan poemon:

Ha —

Mi ja estas plumo blankacigna, kiu flugis ĵus el la ĉielo.

Ha —

En tiu momento malgranda krabo rampis el la maro, vidis la skribaĵon sur la plaĝo kaj ne komprenis ĝin.

"Ĝi estas poemo, ĉu vi komprenas?" demandis la plumo.

"Kio estas poemo?"

"Mi ne povas facile klarigi. Se io tiklas vin tre forte kaj puŝas vin al verkado kaj post verkado vi ne sentas tiklon, tio ja estas poemo." Ŝajnis, ke la malgranda krabo kaj komprenas kaj ne komprenas. Ĝi silente forrampis.

La plumo esperis, ke oni legos ĝian poemon. Sed neniu venis legi. La plumo sentis solecon kaj ĵukon. Ĝi do verkis alian poemon:

Ha —

Mi ja estas plumo blankacigna, kiu volas flugi al la ĉielo.

Ha —

Ĵus kiam la plumo finis la skribadon, ondoj ruliĝis sur la plaĝon, forbalais ĝian verkaĵon kaj portis la plumon en la maron.

Blua estis la ĉielo, blua estis la akvo. Kuŝante sur la maro, la plumo rigardis al la ĉielo. Ŝajnis al ĝi, ke ĝi flugas denove en la blua ĉielo. ■



kilometrojn ĉiusekunde. Ĝi brulis fendigante kaj diŝerigante, kiel fajra drako dancante en la nokta ĉielo.

● Zijinshan-observatorio de Nankino prognozis, ke en tiu ĉi jaro atingos sian kulminon la 22-a ciklo de la suna movado, karakterizita per oftigo de suna flagro. Surbaze de historiaj faktoj oni antaŭdiris, ke 1990 estos jaro kun multaj katastrofoj.

● Lastatempe ĉinaj arkeologoj elfosis el plaĝo de la Flava Rivero en Yongji-gubernio de Shanxi-provinco kvar ferajn Zhenhe-bovojn kaj kvar ferajn

bovitojn, kiuj, pli ol mil jarojn sub la tero, estis faritaj en Kaiyuan-erao (713-742) de Tang-dinastio. La malkovro estas tre valora por studi pri la metalurgio, akvoutiligo kaj pontoj de tiu dinastio kaj la transformiĝo de la Flava Rivero.

● Guanyin-monto sur Qushan-insulo en la Orienta Ĉina Maro komencis akcepti vizitantojn kiel nova budhisma pitoreskejo. Sur la monto majestas templo. En la halo staras statuo de Ŝakjamunio 1.7 metrojn alta kaj 1.7 tunojn peza kaj sidas laŭvice ĉe muro 1000 marmoraj budhostatuoj, kiuj estas tre raraj en Ĉinio pro sia blankeco kaj delikateco.

Ĉina ŝako (VIII)

de RONG HUI

FINA STADIO (1)

Kiam la ŝakludo iras ĝis tia stadio, ke sur la ŝaktabulo la ŝakpecoj restas malmultaj, sed ankoraŭ ne vidiĝas, kiu gajnas la venkon, tiun stadion oni nomas fina stadio.

En la fina stadio pro malmulte da ŝakpecoj estas pli facile lerni por komencantoj. Malsamaj finaj stadioj postulas malsamajn ŝakmovojn. Precipe en tiuj finaj stadioj tiu, kiu la unua movas ŝakpecon, gajnos la venkon kondiĉe ke li movas la ŝakpecojn laŭ la difinitaj movoj, alie li fuŝas la aferon kaj perdas la ludon eĉ per unu erara movo.

Komencantoj devas unue sin ekzerci per finaj stadioj, poste per mezaj kaj fine per komencaj stadioj. Tio estas oportuna por posedo de la ludo.

Nun ni prezentas la finajn stadiojn kun soldatoj, ĉevaloj, kanoj kaj ĉaroj.

Finaj stadioj kun soldatoj

En tiuj finaj stadioj, sur la ŝaktabulo restas nur soldatoj kiel ata-

kaj ŝakpecoj.




En la bildo 1, la ruĝa partio povas venki tute egale, kiu movas ŝakpecon la unua. La metodo estas jena: Kiam la nigra partio movas la nigran gvardianon malantaŭen, la ruĝa soldato moviĝas antaŭen al la flanko sen gvardiano.

En la bildo 2, la forto de la ruĝa partio estas malpli granda ol tiu de la nigra, sed la ruĝa partio povas pacigi la ludon. La konkretaj paŝoj estas jenaj: La ruĝa soldato moviĝas de la 6-a linio al la 5-a, la nigra ĉefgeneralo moviĝas de la 5-a linio al la 6-a; la soldato moviĝas de la 5-a al la 6-a, la ĉefgeneralo moviĝas de la 6-a al la 5-a; la soldato denove moviĝas de la 6-a al la 5-a, la ĉefgeneralo moviĝas de la 5-a al la 6-a; la soldato removiĝas de la 5-a al la 6-a. La ruĝa partio pacigas la ludon per unu ŝakiga paŝo kaj unu senfara.

En la bildo 3, la ruĝa partio havas malpli superan forton ol tiu de la nigra partio, sed la ruĝa partio povas pacigi la ludon. La

ruĝa partio la unua faras movon kaj retiras malantaŭen la gvardianon de la 5-a linio al la 4-a, la nigra ĉevalo retiriĝas malantaŭen de la 3-a linio al la 5-a; la ruĝa soldato sur la 4-a linio moviĝas antaŭen unu paŝon, la nigra ĉevalo moviĝas de la 5-a linio antaŭen al la 7-a kaj ŝakigas la ruĝan ĉefgeneralon; la ruĝa ĉefgeneralo moviĝas de la 4-a linio antaŭen unu paŝon, la nigra ĉevalo moviĝas de la 7-a linio antaŭen al la 8-a kaj refoje ŝakigas la ruĝan ĉefgeneralon; la ruĝa ĉefgeneralo sur la 4-a linio retiriĝas unu paŝon, la nigra ĉevalo retiriĝas de la 8-a linio al la 9-a; la ruĝa soldato sur la 4-a linio moviĝas antaŭen unu paŝon, la nigra ĉevalo moviĝas de la 9-a linio al la 7-a; la ruĝa soldato moviĝas de la 4-a linio al la 3-a dekstren, la ruĝa gvardiano moviĝas de la 4-a linio al la palaca centro, la nigra partio ne povas fari mortigan atakon. Se la nigra soldato kaptas la ruĝan gvardianon, ankaŭ ĝi ne povas fari mortigan atakon. Ĉar ambaŭ partioj ne povas venki unu la alian, tial ili paciĝas.

En la bildo 4, la tri soldatoj de la ruĝa partio batalas kontraŭ la nigraj kompletaj gvardianoj kaj elefantoj, ili ambaŭflanke baras al la elefantoj vojojn kaj fine venkas, kaptinte la du nigrajn gvardianojn per ofero de unu soldato.



linio antaŭen al la 4-a; la ruĝa ĉefgeneralo moviĝas dekstren de la 5-a linio al la 4-a, la nigra gvardiano moviĝas de la 6-a linio antaŭen al la 5-a; la ruĝa soldato moviĝas dekstren de la 6-a linio al la 5-a kaj kaptas la nigran gvardianon, la nigra gvardiano retiriĝas de la 4-a linio al la 5-a kaj kaptas la ruĝan soldaton; la ruĝa soldato moviĝas dekstren de la 7-a linio al la 6-a, la nigra gvardiano moviĝas

de la 5-a linio antaŭen al la 6-a; la ruĝa ĉefgeneralo moviĝas maldekstren de la 4-a linio al la 5-a, la nigra elefanto moviĝas de la 1-a linio antaŭen al la 3-a; la ruĝa ĉefgeneralo moviĝas maldekstren de la 5-a linio al la 6-a, la nigra gvardiano retiriĝas de la 6-a linio al la 5-a; la ruĝa soldato moviĝas dekstren de la 6-a linio al la 5-a, kaptas la nigran gvardianon kaj faras mortigan ŝakigon al la nigra ĉefgeneralo. ■

(Daurigo de p.15)

danto de la leĝdona institucio, gravaj oficistoj de la registaro, la unua juĝisto de la kortumo de fina juĝo kaj supera kortumo devas esti ĉinaj civitanoj, kiuj konstante loĝas en Hongkongo kaj ne rajtas loĝi eksterlande. Tamen konsidere la konkretajn kondiĉojn de Hongkongo, la baza leĝo permesas, ke membroj de la leĝdona institucio estu konstantaj loĝantoj de Hongkongo, kiuj ne havas ĉinan ŝtatancon kaj kiuj havas la rajton loĝi eksterlande, tamen ilia nombro ne devas superi 20% de la membraro de la leĝdona institucio.

Dem.: Ĉu la baza leĝo povas garantii la prosperon kaj stabilecon de ekonomio k.a. de Hongkongo?

Resp.: Certe. La baza leĝo specifas la ekonomian sistemon kaj politikojn de Hongkongo ĉefe en financo, mon-cirkulo kaj aliaj 6 kampoj. Ekz. en la kampo de mon-sistemo Hongkongo ne praktikos fremdvalut-administran sistemon, daŭre funkciigos merkaton de fremdlandaj valutoj, oro kaj valorpapiro, garantios la cirkuladon, importon kaj eksporton de ĉia kapitalo, kaj garantios la entreprenadan liberon de financo kaj financa merkato. Koncerne la eksteran komercon, ĝi difinas, ke estas protektata ĉia investo de fremda lando, garantiata la cirkulado de varoj, senformaj riĉaĵoj kaj kapitaloj, kaj oni ne postulas alian doganon, krom se estas apartaj difinoj. En la nomo de "Hongkongo, Ĉinio" Hongkongo povos partopreni koncernajn internaciajn organizojn kaj komercajn kontraktojn, kiaj ĝenerala kontrakto de dogano kaj komerco, internacia tekstilaĵa komerco.

Koncerne edukadon, sciencan, kulturon, sporton k.a., la baza leĝo havas apartajn difinojn, kiuj avantaĝos al la tieaj loĝantoj kaj akcelos la prosperon kaj stabilecon. ■

Humuraĵoj

● Tri infanoj demandis sian patrinon, kion ŝi deziras en la patrino festo-tago. La patrino respondis: "Mi deziras havi tri obeemajn infanojn." "Bonege, ni baldaŭ estos ses fratoj!" ĝojkriis la infanoj.

● Kliento ŝovis trinkmonon en manon de kelnero kaj diris: "Hodiaŭ mi volas min mem regali per bongustaj pladoj. Ĉu vi povus proponi al mi aparte frandajn pladojn?" La kelnero sin klinis al li kaj flustris: "Pli bone vi vizitu la najbaran restoracion."

● Televida programero prezentis kobron, knabo diris al la patro: "Ho, okuloj estas tiel populara uzataj."

● "Aming, kiel vi kondukis las-

tatempe en la lernejo?"

"Bonege, paĉjo. En piedpilka ludo mi estas avanulo kaj en la lecionoj mi estas arierulo."

● Sinjorino plendis ĉe kuracisto: "Mia edzo pensas tuttage pri nenio alia krom mono."

La kuracisto konsolis ŝin, dirante: "Estu trankvila. Venigu lin al mi, li baldaŭ perdos la monon."


● Unu poeto diris: "La mondo estas tro maljusta."

"Pro kio?" demandis lia amiko.


"Ekzemple, bankestro verkis malbonan poemon, oni rigardas tion ne grava. Se unu poeto pagas nekovritan ĉekon, vidu kio okazos!"

Amuzajeto

La maldekstra bildo el 6 ringoj povas fariĝi dekstra bildo post movo de du ringoj, bonvolu provi.



Bildo 4 NIGRA PARTIO



KORE mi dankas pro neatendita sendaĵo. Ĝi estis vere surpriza, ĉar mi neniam supozadis gajni premion en de vi aranĝita konkurso. Mi konfirmas do bonordan ricevon de premio kaj kalendaro, esprimante samtempe mian koran dankon. Ricevitaj memoraĵoj elvokis kaj

helpon. Post multaj jaroj de japana okupado kaj liberigaj bataloj, la tuta lando estis ekonomie elĉerpita kaj detruita. Ni neniam forgesos kiel kore kaj frate oni salutis nin ĉe ĉiu nia alveno. Okazadis multnombraj renkontiĝoj, solenaĵoj, ekskursoj, ĉe kiuj mi povis konvinkiĝi pri senlima pa-

kiuj havis signifoplenan gravecon en historio ne nur de Ĉinio, sed ankaŭ de la tuta homaro.

Dum pli ol 10 jaroj, mi naĝadis sur ŝipoj apartenantaj al novfondita komuna ĉina-pola ŝipa entrepreno "Chipolbrok". Menciinde estas, ke inter ŝipoj apartenantaj

vigligis miajn rememorojn el freŝa pasinteco kaj devigis min iom pli vaste prezenti al vi motivon: Mi kaj Ĉinio.

Mia granda aventuro, kaj samtempe ĉiam pliiĝanta ekinteresiĝo pri Ĉinio, komenciĝis en cirkonstancoj iom ne konvenaj. En la jaro 1953, kiel ŝipano de Pola Komerca Ŝiparo, mi havis okazon la unuan fojon ekvidi Ĉinion. Nia ŝipo alvenis tiam al malgranda haveno Yulingang en la suda parto de insulo Hainan. De tie, en asisto de ĉinaj militistoj, ni direktiĝis al Kantono. Nia ŝipo estis tiam unu el la unuaj ŝipoj, kiuj trarompis imperiisman blokadon, ĉirkaŭantan Ĉinion post venko de popola revolucio. Pro tio, ĉi tiuj vojaĝoj ne estis tiom facilaj kaj sendanĝeraj. Miaj kamaradoj el alia pola

MI KAJ ĈINIO

En miaj rememoroj mi ĉiam kun sento konservos Ĉinion

de STANISLAW WINNICKI (Pollando)

al ĉi tiu entrepreno, troviĝis m/s ZAMENHOF, sur kiu mi faris 2 vojaĝojn al Ĉinio. Entute mi faris, dum pli ol 20 jaroj, 22 tiajn vojaĝojn al Ĉinio, do granda parto de mia aktivlabora biografio estas kunligita kun via lando.

Vizitante fabrikojn kaj entreprenojn, mi admiradis unikan akuratecon kaj precizecon de gelaboristoj, ilian dediĉiĝon al komuna sukceso kaj prospero. Mian specialan laŭdon akiris ĉinaj metiistoj, kiuj per sia precizeco kaj pacienco formis verajn artajn verkojn, indajn je plej alta admiro. Jam post kelkaj vojaĝoj mi fariĝis entuziasmulo de ĉina kuirejo — cetere disfamigita en la tuta mondo. Por havi eblecon profiti ĝin ankaŭ ekster Ĉinio, mi arigis iom da receptoj kaj konigis ilin

ŝipo, enkarcerigitaj en Taiwan, nur post multaj monatoj povis reakiri liberecon kaj reveni al la patrujo kaj familioj.

Post la unua, sekvis pluaj vojaĝoj. Plej memorinda, pro lacigo kaj danĝero, estis unujara vagado inter Konstanta (Rumanio) kaj Huangpu ĉe Kantono sur ŝipo kun simbola nomo "Wspolpraca" ("Kunlaboro"). Ni transportis tiam benzinon ege necesan por aktivigi paralizitan enlandan transporton kaj vigligi industrion. Mi do ne miris, ke ĉiu gluto de ĉi tiu bieno estis ege zorgeme pri-traktata de ĉinaj havenlaboristoj.

Ĉinio tiam nepre bezonis ĉian

triotismo kaj entuziasmo de ĉiuj popolanoj. Iom post iom mi havis okazon pli bone koni Ĉinion kaj interkonatiĝi kun ĝi. Ĝis tiam mia scio pri Ĉinio estis tute elementa, elportata el lerneja edukado kaj hazardaj legadoj. Ĉinio aperadis do al mi pli kiel ekzotika ol reala lando, kun samaj problemoj, kiujn havas konataj de mi landoj kaj popoloj.

Dum sekvantaj jaroj, kiam nesukcesa blokado iom post iom mildiĝis, niaj ŝipoj komencis direktiĝi al la norda parto de Ĉinio. Tie mi havis unikan okazon, dum multaj por ni aranĝitaj ekskursoj, konatiĝi kun riĉa historio, ekkoni miljarajn antikvaĵojn kaj atingiĝojn,

al miaj familianoj.

Estis tamen procesoj (aferoj) kaj okazintaĵoj, kiujn mi ne povis plene kaj senhezite akcepti. Eble pro tio, ke mi ne havis pli precizan rekonon, aŭ mi tro malmulte orientiĝis en ĉina specifiko kaj karaktero de ĉinoj. Ĉi tie mi menciis la periodon de la t.n. Kultura Revolucio kaj kunligitajn kun ĝi multnombrajn tragediojn kaj neniiĝon de tiel antikva kultura heredaĵo. Troigita ŝajnadis al mi kulto de idolo, kiu al homoj alskribas preskaŭ diajn atributojn kaj kvalitojn. Iom strangaj kaj tro fruaj, sed plene entuziasmaj agoj (operacioj), ŝajnadis al mi ekzemple tro rapida kolektivigado, primiti-

Lukse-rave pri Ĉinio

— Pri la bildlibro “Vojaĝo tra Ĉinio”

de JÓZSEF KISS HORVÁTH (Hungario)



VOJAĜO TRA ĈINIO. Kompilis: la redakcio de “El Popola Ĉinio”. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1986. 26 cm, 136 p. Prezo por Hungario: 320 forintoj.

Dum sia historio Ĉinio longe estis “Malpermesita Lando por eksteruloj, sed ankaŭ post la malfermo de la pordegoj ĝi restas daŭre neatingebla por multaj pro financaj-distancaj kialoj. La enormaj ŝanĝiĝoj en tiu ĉi lando dum ĉi kelkaj jaroj kaj nelaste la beninda klopodo de “El Popola Ĉinio”, diskonigi ĉion karakterize kaj interese ĉinan, vekas deziron en ni multaj, koni pli profunde ĉi tiun malnovan, varian kaj riĉan kulturon. “Vojaĝo tra Ĉinio” nun malfermas fenestrojn por tiuj, kiuj ne povas enpaŝi, kaj servas gvidlibre por tiuj feliĉuloj, kiuj povas mem malfermi la pordegojn de ĉi tiu ne plu sin-

forferma lando.

La libro gvidas nin tra 25 vizitindaj urboj en la orienta kaj suda partoj de Ĉinio. Ĝi estas kvazaŭ agrable babilanta “vojkunulo”, kiu volonte rakontas pri la historio, vidindaĵoj, kutimoj, pladoj kaj kuriozaĵoj de sia lando, donas utilajn konsilojn, kie kaj kion viziti, kiun hotelon elekti, kiujn memoraĵojn aĉeti. Skiza mapo komence de la libro orientas la leganton pri la geografia situo de la unuopaj turismaj lokoj, kaj komence de ĉiu ĉapitro ni trovas apartan mapeton, indikantan la vizitindajn lokojn. Kaj ĉefe kaj antaŭ ĉio, la libro montras — per perfekte ellaboritaj, plaĉe aranĝitaj artvaloraj kolorfotoj (nombre pli ol unu kaj duoncento) — la plej variajn vidindaĵojn: templojn, pagodojn, marajn, riverajn kaj montajn pejzaĝojn, grotojn, ĉiutagajn

scenojn surstratajn, maŭzoleojn, lokajn metiartaĵojn, pladojn kun loka gusto, statuojn kaj restaĵojn. Oni havas la impreson troviĝi en riĉa pinakoteko, en kiu oni certe sentus sin perdita, se lerta ĉiĉerono, mi dirus ja agrable vojkunulo — kia estas ĉi tiu libro — ne gvidus nin saĝe: sekvante la principon “Tro multa estas malmulta”. La vizitanto forlasas la pinakotekon — la leganto fermas la libron — kun la bona sento esti ricevinta klaran impreson pri la afero.

Ĉiu ĉapitro donas mallongan historian fonon por la vidindaĵoj. Sen rimarki, dum la aŭskulto de la senĝena babilado de nia “kunvojaĝanto” ni konatiĝas kun la ĉefaj fluoj de la ĉina historio. La mapoj kaj la geografiaj klarigoj lokas la urbojn en nia imago en konkretan ĉirkaŭaĵon. La “babilo” estas neniam tro longa, ne

va forĝado de fero kaj pereigo de birdoj sur kampoj.

Eĉ se supre menciitaj ekzemploj, laŭ malfrua historia prijuĝo okazis fakte eraraj, tamen ili estis nur ege malgrandaj epizodoj en multjara historio kaj nesignifaj, kompare kun finaj atingiĝoj de la ĉina popolo.

Pasis jam dekelkaj jaroj ekde mia lasta vizito en Ĉinio. De miaj kamaradoj maristoj mi ekscias, ke nuntempe mi ne rekonus Ĉinion. Tiel rapida kaj grandskala estas ĝia progreso en ĉiuj sferoj de ĉiutaga vivo, kaj Ĉinio, kia konserviĝis en mia memoro, apartenas jam al pasinteco. Ĉe ĉiu paŝo oni observas rapidan transformadon de

Ĉinio en modernan, prosperan kaj novtempan landon.

Tamen en miaj rememoroj mi ĉiam kun sento konservas Ĉinion kiel landon de miaj neforgeseblaj travivaĵoj, landon de multaj gemikoj, landon, kie mi pasigis tiel grandan parton de mia aktivlabora vivo. ■

altrudas antaŭkonceptojn, ne tufigas per nesinceraj laŭdoj kaj ne ŝarĝas per superflujaj detaligoj. La teksto estas lingve senriproĉa, inda al la enhavo kaj formo. Karakteriza estas pri la zorgemo de la redakcio de "El Popola Ĉinio".

Nia "kunvojaĝanto" kondukas nin unue al Pekino, kie — ni ekscias de li — jam antaŭ 500 mil jaroj oni loĝis (la "pekin-homoj"). Ĉefurbo (de la regno Jan) ĝi fariĝis en la 6-a j.c. a.K. Ĉi tie troviĝas la plej granda palaca konstruaĵaro de Ĉinio el la 15-a jarcento.

"Ĉefurbo norde de la Granda Muro" nomiĝis Ĉengde, urbo 250 km nordoriente de Pekino. Ĉi tie troviĝas la templo Putŭozongĉeng, imitaĵo en nacimalplimulta stilo de la fama Potala-Palaco en Tibeto. Nepre vizitindas ankaŭ la frua ĉefurbo de Ĉing-dinastio Ŝenjang kun la Imperiestra Palaco kaj la maŭzoleoj de la unuaj du imperiestroj de la dinastio. Kaj en la antikva ĉefurbo Nankino mi rigardus la maŭzoleon de Ĝu Jŭangang, la unua imperiestro de la dinastio Ming, kaj la grandiozan memorejon por la granda revoluciulo Sun Jatsen. Kun nekredema miro mi legis, ke antaŭ pli ol 2 400 jaroj la reĝo Fuĉaj ordonis fosi en la malsupra baseno de Jangzi-rivero kanalon (ĉe la urbo Jangĝoŭ), 150 km lon-

gan! Ĝi estas la plej antikva kanalo de la mondo.

Kiu volas vidi diversajn tipojn de ĉinaj ĝardenoj, vizitu la urbon Suĝoŭ. Por tiuj, kiuj volas ĝui la historian etoson de malnova urbo, proponindas Ŝaŭŝing. Ĉe la komenco de la Silka Vojo en la urbo Ŝji'an oni povas admiri la famajn argilajn militistojn de la Unua Imperiestro de la dinastio Ĉin. En Ĝengĝoŭ la Flava Rivero "pendas", ĉar la riverlito 4-10 m pli altas ol la apudbordaj terenoj. Sur la Tibeta Altebenaĵo, alta je 3 700 m, mi nepre rigardus la 13-etaĝan, 110 m altan Potala-Palacon, vintran sidejon de Dalaj-lamaoj, kiu estas la plej granda kaj plej komplete konservita konstruaĵaro sur la "Tegmento de la Mondo". Krome ravas nin bildoj pri Ŝanhajo, Daljan, Harbin, Uŝji, Hangĝoŭ, Lŭojang, Ĉangŝa, Kantono, Gujlin, Kunming, Ĉongĉing, Uhan kaj la mirinde pitoreskaj Tri Gorgoj de la rivero Jangzi.

La bildlibro estas alloga kaj konvinka invitilo por tiuj, kiuj ankoraŭ ne vidis Ĉinion, kolekto de memoraĵoj por tiuj, kiuj bonŝancis viziti ĝin, kaj "pinakoteko pri Ĉinio" por ili ambaŭ. Kaj nelaste: rava varbilo por Ĉinio kaj ankaŭ por Esperanto!

El "Hungara Vivo", 89/4.



La edzino de Lamazaxi en teksado

PRO historia kaŭzo iuj tibetanoj elmigris en Hindion, Nepalon, Usonon kaj aliajn landojn. En la pasintaj pli ol 30 jaroj nemalmultaj el ili edziĝis tie, tamen kun la paso de tempo ili pli kaj pli sopiris la hejmlandon. Post 1980 parto de la elmigrintoj revenis al la patrolando. En Xiahe-gubernio mi vizitis kelkajn el ili.

Xiahe-gubernio en la suda parto de Gansu-provinco famas pro Labuleng-templo, unu el la 6 grandaj lamaismaj temploj (4 en Tibeto kaj unu, Tar-templo, en Qinghai-provinco), kaj la gubernio fariĝis loko dense loĝata de tibetanoj. De post 1980 jam 36 familioj de tibetanoj revenis tien el fremdaj landoj. La gubernia registaro faris por ili fiksloĝan proceduron kaj subvenciis ilian fiksloĝon kaj ĉiutagan vivon laŭ la nombro de iliaj familiaj membroj.

Lamazaxi, pli-ol-50-jara forta viro, diris al mi, ke antaŭe li faris komercadon en Hindio kaj

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.6	9480
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165

Sopiro al la hejmlando

ilia familio vivis bone, tamen li ĉiam sopiris siajn maljunajn gepatrojn, kiuj vivas en Ĉinio. En 1984 li vizitis la gemaljunulojn kaj vidis, ke en Ĉinio la politiko estas stabila kaj la ekonomio disvolviĝanta. Fine li decidis reveni kun la edzino kaj filino al Xiahe por fiksloĝi. Nun lia edzino teksas tapiŝojn en la hejmo, lia filino vizitas mezlernejon kaj li mem navetas inter Tibeto kaj Xiahe por komerci per varoj bezonataj de tibetanoj. Ĉiujare lia familio enspezas sufiĉe multe kaj vivas tre bone.

Mi venis en la domon de la 71-jara Angkao. La domo estas du-etaĝa, sur la komerca strato, apud Labuleng-templo. En ĝia unua etaĝo li vendas komercaĵojn kaj en ĝia dua etaĝo loĝas lia familio. La domo estas ekip-

ita tre lukse. Malantaŭe troviĝas unu-etaĝa domo kun kelkaj ĉambroj, servanta kiel gastejo. Angkao estas prudenta kaj parolema. Antaŭe li funkciigis restoracion en Hindio kaj havas ŝparmonon. Ĉar kelkdek jarojn li ne korespondis kun siaj familianoj kaj aŭdis iujn mispropagandojn, li estis tre singarda rilate revenon al la hejmlando. En 1982, profitante la okazon viziti la hejmlandon, li faris surlokan esploradon. Li vidis, ke la patrolando multe ŝanĝiĝis kaj ĉio estas pli bona ol kiel li imagis. Tial en 1984 lia tuta familio transloĝiĝis en Xiahegubernion.

Je mencio de sia etaĝdomo okulfrapa en la loko Angkao estis iom fiera. En 1988 li ekŝatis la lokon kaj elspesis sian tutan ŝparmonon por starigi ven-

dejon. Sed ne sufiĉis la mono, li do petis helpon de la registaro kaj ĉi tiu tuj seninterese kreditis lin per 50 000 juanoj, kio solvis lian urĝan problemon. Li komercas kaj funkciigas gastejon kaj ĉiujare li enspezas ĉ. 50 000 juanojn. Kun mono li pensis antaŭ ĉio, ke li devas kvitiĝi kun la registaro. Li laboras aktive kaj entuziasme, tial oni elektis lin kiel membron de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la subprovinco kaj gubernio, ke li komencis partopreni en ŝtataj aferoj.

Plejparto de la tibetanoj kredas lamaismen. La domo de Pengcihe havas tri vastajn ĉambrojn, el kiuj unu servas al religio. Ĉiutage lia familio murmuris tie sutron. Li diris, ke nelonge post kiam li atingis Hindion, li deziris reveni al la hejmlando. En Hindio li ne edziĝis por kiel eble plej baldaŭ reveni al la hejmlando. En 1982 li fine revenis en Xiahegubernion kiel unu el la unuerenintaj tibetanoj. En 1983 li edziĝis al tibetana knabino Qiezhong. Nun ili havas du infanojn. La mastro faras komercadon kaj la tuta familio vivas feliĉe.

Laboranto de la Buroo de Naciminoritataj Religiaj Aferoj diris, ke inter la revenintaj tibetanoj estas 12 lamaoj. Laŭ ilia deziro la registaro loĝigis ilin en Labuleng-templo. Nun ili, en ruĝa kasajo, kun rozario, dediĉas sian tutan energion al lamaismo. ■

Angkao akceptas klientojn.





LI QIANG:

BUTERA FLORO



En la temploj de tibeta budhismo kaj en niĉoj de hejmoj de multaj tibetanoj vidiĝas diversaj buteraj floroj. La buteraj floroj originas de Tibeto. Laŭ tradicio kiam princino Wencheng de la imperiestra familio de Tang-dinastio (618-907) edziniĝis al la tubo-a reganto Sunzamkampo, ŝi kunportis en Tibeton budhan statuon, kiun oni metis en Dazhao-templon de Lhasa. Ĉar sur la altebenaĵo ne estis freŝa floro vintre pro malvarmego, la postaj

budhistoj do faris florojn el butero kaj metis ilin antaŭ la budhan statuon. En la sekvantaj jaroj tiu arto pli kaj pli perfektigis. El butero oni faris diversaspecajn budhajn statuojn, homfigurojn, naturajn pejzaĝojn, animalojn, vegetalojn kaj diversajn konstruaĵojn. El butero oni eĉ povas fari figuro-grupon, kiu rakontas fragmenton de budha sutro. La buteraj floroj de Tar-templo, Qinghai-provinco, estas la plej altnivelaj. ■

VOJAĜO EN WUMENG-MONTO

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINGYAN

WUMENG-MONTO je 2 300 m. super la marnivelo, ĉe la limo inter la provincoj Yunnan kaj Guizhou iras de nordoriente sudokcidenten. La loko elspiras Sichuan-, Yunnan- kaj Yelang-

kulturojn. En la monto vivas de antikve viglecplenaj mjaŭ-oj. En frua printempo senĉese pluvetas kaj nebuloj varias en la monto. La koto ege malfaciligis nian vojaĝon. Tutaj en ŝvito kaj pluvakvo, ni malfacile serĉis tieajn his-

toriajn restaĵojn.

ŜTONAJ STATUAROJ EN LA STELO-RIGARDA MONTPINTO

Wumeng-monto trairas Weixin-gubernion de okcidente

Ŝoseo sur Wumeng-monto



orienten. Tie la Stelo-rigarda Montpinto estas fama. La nomo devenis de Wu Sangui (1612-1678), generalo de Qing-dinastio, kiu rigardis al steloj tie. Ĝi sidas pli ol 50 km nordoriente de la guberniurbo Weixin. La aŭtoj povis nur atingi la montpiedon kaj ni, elaŭtiginte, grimpis sur ĝin laŭ kota vojo. Ni penis tri horojn en pluvo kaj nebulo kaj fine trovis dislokitajn ŝtonajn statuojn inter bambuaro kaj pinaro sur ruino de templo.

La ŝtonaj statuoj estis faritaj en Ming-dinastio (1368-1644). Poste ili estis plurfoje difektitaj kaj restituitaj. La statuoj estas diversformaj. Oni povas malfacile konstati, en kiu dinastio ili estis restituitaj. Kaj ankaŭ estis malfacile certigi, kie oni faris ilin, ĉu ĉe la montpiedo aŭ sur la monto.

El la nun vidataj bazoj de ŝtonaj kolonoj oni konas, ke la templo kroĉiĝis al la montodeklivo. Kun naŭ haloj ĝi rigardis okcidenten. En ĉiu halo staras grupo da ŝtonaj statuoj kaj malsamaj vidaĵoj. Nun restas 63 budhostatuo, 12 steleoj kaj 12 paroj da kuriozaj ŝtonbestoj. Krome, tie

troviĝas ankaŭ ŝtonaj kolonoj, benkoj kaj reliefoj. La krude faritaj bestoj plejparte vidiĝis en prahistoriaj mitoj; kaj la bildoj sur altaroj kaj putfostoj originas el rakontoj de ĉinaj klasikaj romanoj. La nebuloj jen kovris la ŝtonajn statuojn, jen disiĝis de ili. Promenante tie, oni sentas sin kvazaŭ en fea lando.

La plej alta loko de la templo estas sur la kulmino de la monto kaj tie staras altaj lanternaj stangoj. Legendo diras, ke nokte de ĉiu festotago sennombraj olelantonjoj brilis, kvazaŭ maro da steloj sur la monto. Aparte forte brilis la naŭ grandaj lanternoj pendantaj sur stangoj ĉe la kulmino, kies lumon povis vidi la vilaĝanoj ĉe la limo inter la provincoj Yunnan, Guizhou kaj Sichuan.


Pro ŝanĝiĝo de la direkto de la postiljona vojo malpliĝis la sankteco de la monto en la okuloj de popolanoj. La templo fariĝis ruino kaj restas nur diversformaj ŝtonaj statuoj sur la monto, kio rememorigas pri ĝia brila pasinteco.

CAIHUASHAN-FESTO DE

MJAŬ-OJ

Mjaŭ-oj estas antikva nacio de Ĉinio. Jam en la dinastioj Qin kaj Han (221-220 p.K.) la prapatroj de mjaŭ-oj loĝis en centra Ĉinio kaj poste migris unuj post aliaj al sudokcidenta Ĉinio. Laŭ virinaj kostumoj kaj kapornamoj mjaŭ-nacio estas dividita en plurajn branĉojn, kiaj bunta, blanka, blua, verda kaj nigra. La virinoj de buntaj mjaŭ-oj portas buntan jupon kaj tiuj de la blankaj — blankan jupon. Oni diras, ke la desegnoj kaj strioj sur la plisita jupo simbolas montvojojn iritajn kaj riverojn transpasitajn de ili.

Samkiel mjaŭ-oj en aliaj lokoj, la tieaj mjaŭ-oj solenas sian tradician nacian feston Caihuashan en la unua monato de la jaro. Chaihuashan, alivorte, kolektiva ekskurso, estas partoprenata de miloj da homoj. Ĝenerale, la amuzejo lokiĝas proksime de la vilaĝo, sur milda montodeklivo. En festotago, mjaŭ-aj viroj kaj virinoj, ĉu junaj ĉu maljunaj, kolektiĝas en la amuzejo. Ili arope sidas aŭ staras sur la verda monto kaj distras sin laŭ plaĉo. La tradiciaj aktivadoj estas torei, ludi la blovinstrumenton luŝeng-o, ludi kun garulakso (*Garrulax canorus*) kaj simile. En la amuzejo plej okulfrapa estas la alta stango, kun ĉiamverdaj arbofolioj sur si. Tial ĝi nomiĝas ankaŭ florarbo. Origine ĝi servis kiel bonaŭguro de generado por mjaŭ-oj. Kaj poste, en festado multaj gejunuloj kolektiĝas ĉirkaŭ ĝi kaj ĝuas la spektaklon, kiel oni surgrimpas la stangon kun la kapo malsupren. La grimpantoj portas kolorrubandon ĉe la zono kaj toltukon sur la kapo, kun la dorso apogita sur la stango kaj la manoj sur la dorso. Ili sin fleksas kaj saltas kaj je palpebruma daŭro surgrimpas la kulminon altan je pli ol 10 m. Kaj la pli lerta eĉ ludas la blovinstrumenton luŝeng-o dum grimpad. Ĉiufoje, kiam li sin movas supren, eksonas la in-





En Caihuashan-festo



Butiko en monturbo

strumento.

Caihuashan-festo estas ankaŭ bona ŝanco de enamiĝo por mjaŭ-aj gejunuloj. Ili serĉas siajn amat(in)ojn per reciproko de kantoj. Sur la amuzejo paroj da geamantoj reciprokas amkan-tojn en akompano de la blovinstrumento luŝeng-o. Kun hontemo iu mjaŭ-a junulo interpretis por ni tekston de amkantoj:

*Ne vivas ni kune,
Sed ĝuas ni ĝoje:
Laboron sur rizkampo,
Pasumon en bazaru,
Kaj kotlud' je ripozo...*

Ankoraŭ ne finante la kanton, li kuris for al la amuzejo. Ankaŭ ni estis ravitaj de la kanto.

KOKERIKO AŬDIĜAS EN TRI PROVINCOJ


Ĉe la limo inter la provincoj Yunnan, Guizhou kaj Sichuan, la vilaĝanoj povas aŭdi saman kokerikon por tagiĝanonco.

Ni unue venis al Hezhang kaj Weining ĉe la limo de la provincoj. La loko estas kaj tegmento de nordokcidenta Guizhou kaj trafikala nodo de la koridoro en nordorienta Yunnan. Antikve ĝi

estis teritorio de Yelang-regno. En la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 23 p.K.) imperiestro Wudi sendis homon al sudokcidenta Ĉinio por informi, kiel iri al Hindio. Ĉe akcepto de la sendito de Han-dinastio la reĝo de Yelang-regno arogante demandis, kiu estas pli vasta, ĉu Han-imperio aŭ Yelang-regno. Tio rideksplodigis la senditon. De tio devenis la anekdoto pri la fiera reĝo. Tio montris, ke la reĝo arogantis kaj malmulte sciis. Tamen, Yelang ja estis antikva lando kompare granda en sudokcidenta Ĉinio. Kaj samtempe ĝi estis loko, kie pli frue aperis gastejo sur la vojo Wuchidao. La fera forno de gastejo, elterigita en la urbeto Kele de Hezhang-gubernio, estis uzata en poststacio de la Orienta Han-dinastio. La forno muldita el giso havas cilindran korpon kun krude desegnitaj vejnoj, 12 vertikalajn oblongajn truetojn ĉirkaŭ si, po unu ringtenilon ĉe ambaŭ flankoj, tri subtenilojn por kuiriloj ĉe la aperturo kaj kvar ortilformajn truojn ĉe la fundo. Ĝi, fortika kaj bone aerumita,

taŭgas por kuirado aŭ bakado dum vojaĝo. La fumaĵo sur la internaĵo videblas sufiĉe klare. Tio atestas, ke la forno estis uzata de oficistoj, kiuj vojaĝis de Sichuan suden.

Weining, apartenanta al Hanyang en la Okcidenta Han-dinastio, limtuŝis Yelang. En 1665 tie estis fondita Weining-prefektujo. La kortego de Qing-dinastio opiniis, ke tio povas ĝuigi la loĝantojn per trankvila vivo. Antaŭ la Liberiĝo la muro ĉe la pordo de la provinca registaro estis inkrustita per ŝtonplato kun fizika mapo de ĉiuj gubernioj de Guizhou-provinco. La limlinio de Weining markita sur la mapo estis glatigita pro palpado fare de homoj, kiuj aspiris pri guberniestriĝo. Siatempo Weining estis la plej vasta kaj plej riĉa el la 80 gubernioj de la provinco. Estante guberniestro de Weining, oni povis gajni multon da profito. Caohai-lago okcidente de la guberniurbo de Weining estas vastega. Ĝi estas granda lago de la provinco. Oni elterigis ĉirkaŭ ĝi mallongajn bronzajn spadojn, konkojn kaj



Parto de la Silka Vojo, kie kokeriko aŭdiĝas en tri provincoj

konkujojn, kiuj similas al tiuj de la maŭzoleo de Yunnan-reĝo en la monto Shizhai. Kaj la gravuritaj ideogramoj sur la elterigitaj fajencoj tre similas al tiuj sur bronzaj lancoj en Sichuan en la periodo de Militantaj Regnoj

(475-221 a.K.).

La antikva Suda Silka Vojo trairas la regionon kun malsamaj vidindaĵoj de la tri provincoj, kiuj influas unu alian kaj havas grandan signifon en disradio de la ĉina kulturo. ■



Mjaŭ-a knabino faras vakstinkturajn teksaĵojn.





Urbeto en la montregiono

Ŝtonaj statuoj sur la Stelo-rigarda Montpinto



Pekina opero "Cao Cao kaj Yang Xiu"

Teksto kaj fotoj de LI CHUNGENG

LA Ŝanhaja Pekin-opera Teatro surscenigis novan teatraĵon "Cao Cao kaj Yang Xiu", kiu konigas historieton en la periodo de Tri Regnoj (220-280 p.K.).

La teatraĵo modlis figuron de Cao Cao, ambicia kaj suspektema ĉefministro de Han-dinastio. Li malvenkis en la Kampanjo ĉe Chibi. Li tamen neniom deprimiĝis kaj ĉiam klopodis por releviĝo. Por unuigi la tutan Ĉinion, li serĉadis talentulojn kaj publikigis dekretan por varbi eminentulojn.

La alia grava rolo Yang Xiu

en la teatraĵo estis elstara eminentulo, kiu atendis prudentan suverenon por servi al li. Sed li estis tro fiero pri sia saĝo kaj ofte obstinis en siaj opinioj. Ambaŭ li kaj Cao Cao havis duoblan karakteron kaj de humiliĝo kaj de graveco. Tial ili ne povis kunlabori kaj inter ili okazis tragedio.

Nokte de la Aŭtunmeza Festo, kiam Cao Cao kultis sian konsiliston Guo Jia, li renkontiĝis kun Yang Xiu. Baldaŭ ili intimiĝis kaj Cao prenis Yang kiel sian konsiliston kaj lokis lin sur gravan postenon, dum Yang lojale helpis Cao per sia

talento. Foje Yang sendis tre kapablan oficiston Kong Wendai prepari provianton kaj aĉeti ĉevalojn en malamikaj regnoj. Sed Cao kredis kalumnion al Kong, suspektis kaj mortigis lin, maljuste akuzante lin pri lia perfido. Sed kiam la provianto kaj la ĉevaloj preparitaj de Kong estis alportitaj al la kazerno de Cao, li multe pentis pro sia kulpo. Li do ekskuzis sin, ke li faris tion pro somnambulismo. Li solene entombigis Kong kaj funebre gardostaris apud lia ĉerko por esprimi sian sincerecon al Kong. Sed Yang trapenetris la hipokritecon de Cao. Li petis sinjorinon Qian-niang, edzinon de Cao, nokte porti veston al Cao, ke li protektu sin kontraŭ frosto, esperante vekti ĉe Cao introspekton. Sed Cao murdis sian edzinon por konfirmi sian pretekston, ke li vere suferadis de somnambulismo. Tiel Yang tute malesperiĝis pri Cao kaj estiĝis inter ili malakordo. En la fino, por protekti sian absolutan dignon, Cao murdis Yang, kvankam li jam fariĝis bofilo de Cao.

La rilatoj inter Cao kaj Yang estis simple notitaj en la historiaj libroj. La intrigoj en la teatraĵo estis sukcesa arta reverkado de la scenaristo.


La teatraĵo estis premiita en la tutlanda festivalo de novaj

Yang Xiu akceptas komercistojn, kiuj alportis provianton kaj ĉevalojn al la kazerno.





Cao Cao



Yang Xiu

teatraĵoj, kaj la aktoro Shang Changrong por la rolo Cao gajnis la unuan premion de prezentado. La oracio de Cao legata en la kulto al Guo Jia en la nokto de la Aŭtunmeza Fes- to plene esprimis lian sincere-

con. La rigardantoj facile vidas la sinceran sopiron de Cao al talentuloj kaj lian ambicion krei pacon en la tuta lando. Kiam Cao funebre gardostaris por Kong Wendai kaj murdis sian edzinon, la rolulo kantis:

“La fidon de la popolo mi ne akirus, se la edzineton mi ne mortigus,” “Yang Xiu pelis min en embarasiĝon”. La kantado plena de sentoj rafinite montris la animstaton de ĉi tiu antikva politikisto dronanta en embara-

Cao Cao suspektas Kong Wendai.





Yang Xiu, kiu faris meriton, akceptas robon kiel donacon de Cao Cao.



Cao Cao mortigas sian edzinon.


Cao Cao eksigas Yang Xiu.

siĝo, ke li ne volis kaj ne povis ne mortigi homojn.

Yan Xingpeng sukcese ludis la rolon de Yang Xiu. Li multe kreis en sia prezentado kaj kantado. Inter la skoloj de la pekina opero de Ĉinio, la arto de la skolo de Yan estas tre taŭga por prezenti intelektulojn kaj tragediajn rolojn. Yan Xingpeng majstre posedas la arton de la skolo. En la teatraĵo preskaŭ ĉiuj kantoj baziĝas sur la tonoj por malĝojo, maltrankvilo, indigno kaj tristo. Lia voĉo plena de variemo multe riĉigas la esprimovon.

La harmonia kunlaboro de la du famaj ĉefroluloj kaj la aliaj aktoroj, la impona sceneja dekoracio, la moderna iluminado kaj avangardaj akustikaj ekipaĵoj faris la teatraĵon pli brila kaj pli alloga. ■






La edzino de Yang Xiu admonas lin fuĝi.



Utilaj birdoj

Utilaj birdoj estas bonaj amikoj de la homaro. En 1982 la ĉina registaro decidis, ke semajno en ĉiu aprilo estos semajno de amo al birdoj. Tio estas tre grava por protekti la medion, konservi la ekologian ekvilibron kaj kulturi noblan spiriton de la homoj. La 10-an de septembro de tiu jaro la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis poŝtmarkan serion kaj blokon kun bildoj de utilaj birdoj.

La poŝtmarkoj montras pegon (supre), hirundon (meze), upupon (maldekstre sube), paruon (meze sube) kaj oriolon (dekstre sube). Kaj la bloko montras kukolojn, sur fono de ginko, antikva arbo de Ĉinio.



杜 鹃

